

KIATTO


ISSN 0023-3692

NUMERO 203 (2004:5)

Homaj rajtoj

Diktatoroj

Rifuginto





Jenja kaj Joel dum la studsesio en Strasburgo

Saluton!

Mi volus malfermi ĉi tiun numeron per la vortoj, kiuj estis eldiritaj jam antaŭ pli ol 50 jaroj en la Parlamenta Asembleo de Konsilio de Eŭropo en 1949, sed ne perdis sian aktualecon ĝis nun: "Kiel honesta homo ne povas fariĝi ŝtelisto ene de unu tago, same demokratio ne povas iĝi faŝisma reĝimo. Malbono disvastiĝas nevideble.

Jen tie, jen aliloke oni forprenas la liberecojn. Necesas ekagi, antaŭ ol estos tro malfrue..."

Ĉi-foje *KONTAKTO* tuŝos seriozajn temojn: homajn rajtojn, diktatorecojn kaj rifuĝintojn (diri "traktos" estus iom aŭdace – ja ĉiuj ili estas senlimaj kaj, bedaŭrinde, senfinaj...). Malfermas ĉi tiun numeron la artikolo de Morteza MIRBAGHIAN, Irano/Usono (p.3-4). Li rakontas pri murdo de irandevena fotoraportistino fare de la irana registaro.

Kial ni ŝatas diktatorojn? Kial ofte okazas tiel, ke ruzaj kaj ambiciaj gvidemuloj fariĝas gvidantoj de la popolo? Kaj kial oni ploras, kiam la diktatoroj mortas?.. La respondon proponas d-ro Vladimir SĈOTKIN, Rusio (p.4-5). Ne hezitis esprimi sian opinion ankaŭ nia vic-redaktoro Joel!

Liberigteologio naskiĝis en Centra Ameriko kaj kombinas tri ŝajne nekunigeblajn aferojn – marksismon, religion kaj socian agadon. Pri tio rakontas Calvin CARVER (p.6).

Kapinga Ntumba (D.R. Kongo) estas iama rifuĝinto, kiu en 1996 fuĝis en Zambion. Tute hazarde ni komencis korespondi, kaj, same hazarde, mi eksciis, ke li estis rifuĝinto. Komprenoble, mi tuj petis la rakonton por *KONTAKTO*! Kaj jen, dank' al Esperanto, ni havas la eblon senpere konatiĝi kun la travivaĵoj de la iama rifuĝinto (p.7). Daŭrigas la temon de rifuĝintoj Elisabetta CIRIO. Malsimile al s-ro Ntumba, ŝi ne estas rifuĝinto, tamen ŝi multe scias pri la problemo – tio ja estas temo de ŝia disertacio (p.8-9).


Kio malhelpas interkulturan komunikadon? Pri tio rakontas Sabine MCKINNON, universitata profesoro, kiu ellaboris kaj gvidas universitatan kurson pri interkultura komunikado (p.10).

Kaj jen plia intervjuo – ĉi-foje kun esperantistoj: la nederlanda grupo *Akordo* rakontas pri si kaj pri sia disko *Kristnaska kordo*. Atendas vin ankaŭ kelkaj beletraj rakontoj – de Sejjed Navvab MOZAFFARI, Irano (p.13) kaj Yenovk LAZIAN, Armenio/Francio (p.16). Aldone mi diru, ke la redakcia rakonto *Alisa* estas 100%-e vera!

Agrablan legadon!

Jenja

ENKONDUKE



EL LA LIBRO HOMAJ RAJTOJ: DEMANDĜOJ KAJ RESPONDOJ (UEA).

Provizoraj temoj de la venontaj numeroj de *KONTAKTO* 2005:

- ORGANIZAĴOJ;
- NATURO / BESTOJ;
- POLITIKO / MILITOJ / TUTMONDIĜO;
- FOTADO;
- LINGVOJ;
- MANGAĴOJ;
- FAMILIO (internaciaj geedziĝoj, denaskismo ktp.).

Skribu – tiu decido povas esti ja la VIA. Ekde la jaro 2004 *Kontakto* kunlaboras pri la projekto *Interkulturo* <www.interkulturo.net>. Kune kun la IK-teamo, *KONTAKTO* preparos artikolojn rilatajn al kultura diverseco, interkultura lernado, interkulturaj konfliktoj ktp. Viaj artikoloj / ideoj ĉi-temaj kaj ajnatemaj estas pli ol bonvenaj!

<ENHAVO>

Forkuris la diktatoro, sed daŭras... teroro! (Morteza MIRBAGHIAN, Irano/Usono)	3-4
Kial ni ŝatas diktatorojn? (d-ro Vladimir SĈOTKIN, Uzbekio)	4-5
Ĉu ni ĉiuj deziras esti diktatoroj? (Joel AMIS, Usono)	5
Teologio + marksismo = ??? (Calvin CARVER)	6
Kvin jaroj en la rifuĝejo (Kapinga Ntumba, Demokratia Respubliko Kongo/Zimbabvo)	7
Rifuĝintoj en Britio, aŭ: Kiel unu leĝo kontraŭas la alian (Elisabetta CIRIO, Britio)	8-9
"Sukceso de nia entrepreno dependas de tio, kiel bone ni komprenas niajn komerc-partnerojn" (intervjuo kun Sabine MCKINNON)	10
Kristnaskaj kantoj en Esperanto!; <i>Akordo</i> prezentas sin	11
Alisa: tre facila rakonto (Jenja ZVEREVA, Ukrainio)	12
Anonce	12
La hundkolerozo (Sejjed Navvab MOZAFFARI, Irano)	13
Bumerange/opinie: Valentin MELNIKOV, Rusio;	
Ferdi VINCE, Francio, Sergei KURGINJAN, trad. Sergej PAĤOMOV, Rusio	14
Informe	15
Esperanto-paradizo ĉe Danubo (Yenovk LAZIAN, Armenio/Francio)	16

Forkuris la diktatoro, sed daŭras... teroro!

Morteza MIRBAGHIAN, Irano/Usono

Estis kvazaŭ hieraŭ, kiam la stratoj de ĉiuj iranaj urboj kaj vilaĝetoj estis la scenejoj de ĉiutagaj manifestacioj kontraŭ la monarĥia reĝimo. Tiam mi estis tro juna por kompreni de la profundajn kialojn kaj fonon de la tutlanda protesto kontraŭ la reĝo. Sed tamen mi komprenis, ke li estas diktatoro, kaj liaj agentoj en sekreta servo brutale torturas kontraŭulojn kaj studentojn, kiuj aktivis kontraŭ la despotisma regado. La protestantoj unuanime postulis anstataŭigon de monarĥia reĝimo per moderna respubliko, kiu garantias demokration kaj homajn rajtojn al ĉiuj irananoj.

Revolucioj ĉiam formanĝas siajn infanojn

Sed mi – same kiel ĉiuj miaj samlandanoj – estis tre naiva kredante, ke la revolucio povas alporti tiajn rajtojn por la popoloj. Finfine la reĝo, sub la premforto de la unuiginta popolo unufanke kaj sub la politika premforto de la usona prezidento CARTER [kartr] aliflanke, forfuĝis eksterlanden. Rezulte de tio, la monarĥia reĝimo falis, kaj la nova reĝimo – nome islama respubliko – anstataŭigis ĝin, kun la promeso de ties gvidantoj respekti la homan dignon kaj rajtojn de ĉiuj civitanoj. Sed, kiel oni diras, “revolucioj ĉiam formanĝas siajn infanojn”. Tion pruvis ankaŭ la Irana Revolucio. Tuj post la instaliĝo de la nova reĝimo, la krudaj kaj fanatikaj potencmaniuloj komencis diversmaniere alproprigi la politikan povon. Nun denove la maŝino de torturo kaj ekzekutado de malkonsentantoj komencis funkcii senĉese, nomante ilin “kontraŭrevoluciuloj”, “spionoj”, “agentoj de Usono”, “cionistoj”, “herezuloj”, “naciistoj”, “komunistoj”, “monarĥiistoj”, “moralaj koruptuloj” ktp.

Revolucio, kiu promesis liberecon kaj feliĉon al ĉiuj civitanoj, tuj kreis unu el la plej kruelaj nuntempaj reĝimoj. Ĝi ne nur ne donis al la popolo la liberecon kaj rajtojn, por kiuj ili sindone revoluciis, sed eĉ forprenis la personajn liberecojn, kiujn ili jam havis. Nun oni devas alkonformigi siajn religiajn kaj politikajn konvinkojn kaj kondutojn al tiuj postulataj de la registaro.

Nun la registaro decidas, kian muzikon oni rajtas aŭskulti, kiajn vestaĵojn surmeti, kiajn filmojn spekti, kiajn librojn legi, kun kiuj oni rajtas komuniĝi ktp. Nun, je la nomo de Dio, popoloj suferas plej diablajn kruelaĵojn, kaj je la nomo de justo oni suferas la plej maljustajn traktojn. Mi imagas, ke vi povas kunsenti la ŝokon kaj frustrigon de la naivaj homoj, kiuj sincere partoprenis en la revolucio kaj neniam imagis, ke ili faras tion kontraŭ siaj propraj interesoj kaj rajtoj!

Se vi spektos novaĵo-filmojn pri la irana revolucio, vi konstatos, ke virinoj ludis gravegan rolon en ĝi. Ili amase partoprenis en sangoplenaj manifestacioj kaj ankaŭ kuraĝigis partopreni siajn familianojn. Sed, malgraŭ tio, ĝuste virinoj estis la unuaj viktimoj de la revolucio. Sennombraj virinoj suferis torturon kaj mortpunon pro siaj religiaj aŭ politikaj konvinkoj. Suferis batadon ĝismorte ankaŭ tiuj, kiuj eĉ ne estis politike aktivaj malkonsentantoj.

Morto pro... profesia devo?

Zahra KAZEMI estis unu el tiuj senkulpaj virinoj. Ŝi estis irandevana civitanino de Kanado, kiu laboris kiel sendependa fotoraportisto por diversaj ĵurnaloj en Kanado. Ŝi vojaĝis en multaj landoj kaj sukcese plenumis siajn ĵurnalistajn taskojn. Sed en ŝia patrujo la sorto ne favoris ŝin...

En julio 2003 ŝi estis en Irano. Ĝuste tiam la familianoj (ĉefe patrinoj) de politikaj malliberuloj kolektiĝis ĉe la fifama malliberejo *Evin* – por protesti kontraŭ la maljusta malliberigo de siaj familianoj. Zahra KAZEMI, kiel profesia fotoraportisto, “kaptis” la okazon por fari fotojn kaj raportoj pri la evento – same kiel farus ĉiu profesia ĵurnalista. Sed la agentoj de la sekreta servo arestis ŝin. Post kelkaj tagoj oni raportis, ke ŝi “mortis en malliberejo pro apopleksio”.

Sed tiun klarigon akceptis nek la kanada registaro, kiu protestis defende al la rajtoj de sia civitanino, nek ŝiaj familianoj. La reformista prezidento de Irano, Mohammad HATAMI, ordonis, ke sendependa komitato esploru la aferon. Rezulte evidentiĝis, ke Zahra mortis pro bato de peza aĵo al ŝia kapo, aŭ bato de la kapo al firma aĵo. Alivorte, ŝi estis batita dum enketado pro krimoj, kiujn ŝi ne faris, kaj kiuj entute ne estas konsiderataj krimoj en la civilizita mondo.

Zahra KAZEMI (fotoj 1-4)



INTERRETO



Ŝirin EBADI

Sub la premo de mondaj registaroj kaj homrajtaj organizaĵoj oni promesis ekscii kaj puni la respondeculon.

Kaj kiu vere kulpas?!

Unu jaron poste – en julio 2004 – oni anoncis, ke pri la murdo kulpas iu agento de la sekreta servo. Tamen li, kune kun la oficialuloj de la sekreta servo deklaris, ke li estas senkulpa, kaj la vera krimulo troviĝas en la oficejo de la ĉefpersekutisto de Tehrano. Laŭ atestantoj, la ĉefpersekutisto, kiu fifamas ankaŭ kiel “buĉisto de ĵurnaloj” (ĉar pro liaj ordonoj oni neniigis pli ol cent ĵurnalojn kaj malliberigis multajn ĵurnalistojn), persone respondecas pri ŝia murdo. Sed, kompreneble, gravulojn kiel li, oni ne tuŝas en tia reĝimo – anstataŭe oni preparis marionetan tribunalon por supraĵe prijuĝi simplan agen-

ton. La proceso daŭris nur du tagojn. Ĉeesti rajtis nek reprezentantoj de la kanada registaro, nek tiuj de homrajtaj organizaĵoj. La tribunalo, tamen, ne atendis ĉeeston de atestantoj – ilin prezentis Ŝirin EBADI, la advokato de la familio de la viktimo. (Pro siaj aktivaĵoj rilate homajn rajtojn en Irano ŝi antaŭnelonge gajnis la Nobel-premion pri paco.) La tribunalo supraĵe, sen necesa esploro, konkludis, ke mankas pruvoj kaj, senkulpiginte la akuziton, fermis la kazon... La kanada registaro proteste revokis sian ambasadoron el Tehrano kaj minacis, ke ĝi daŭrigos la aferon en la Monda Tribunalo kaj UN. La advokato – Ŝirin EBADI – anoncis, ke ŝi utiligos ankaŭ ĉiujn internajn kaj internaciajn rimedojn por justa priesploro de la murdo por puni la respondeculojn. La konflikto ankoraŭ

daŭras. Espereble, la vero baldaŭ malkovriĝos, kaj la krimuloj ricevos la punon, kiun ili meritas. Sed tio tamen ne redonas la vivon al 54-jaraĝa Zahra KAZEMI, kiu povintus ankoraŭ longe ĝui la vivon kun siaj familianoj.


Ŝi estis nek la unua, nek la lasta viktimo de la brutala registaro, kiu havas nenian respekton al homaj rajtoj. Kaj se ŝi ne estus kanada civitanino, ankaŭ pri ŝi ni estus aŭdintaj nenion, same kiel pri multaj aliaj nekonataj viktimoj... Estas vere koraŝire vidi, ke revolucio, kiu supozeble devintus alporti liberecon kaj feliĉon al siaj infanoj, ne nur ne plenumis siajn promesojn, sed eĉ plej kruele forprenis ĉiujn plej bazajn rajtojn de la civitanoj...

Estas unu demando, kiu konstante vagadas en mia menso kaj kies respondo mi ankoraŭ ne trovis: KIAL?

Kial ni ŝatas diktatorojn?



Benito MUSSOLINI (maldekstre) – faŝista diktatoro en Italio – kaj HITLERO: ĉu malsukcesoj en pentrado igis lin serĉi “sukcesojn” sur alia kampo?..



Saddam HUSEJN: ĉu laika diktatoro?..



Josef STALINO: li murdis milionojn, sed kiam li mortis, oni ploris...

d-ro Vladimir ŜĈOTKIN, Uzbekio

Se rigardi la pasintecon – proksiman kaj malproksiman, ĉie oni povas vidi figurojn de diktatoroj, kiuj estis (kaj foje ĝis nun estas) adorataj de iliaj samlandanoj, samarmeanoj, familianoj; malgraŭ teruraj kruelaĵoj, amasmurdoj de senkulpaj homoj. Kie kaŝiĝas la kialo de tiu nekomprenebla fenomeno, ke la homoj sincere priploras tiujn ĉi “heroojn”, kiuj “brave” frakasis la sortojn de multaj milionoj da homoj?

Faru kiel mi!

Unue esploru ni la animon de aparta homo; ja amo kaj malamo estas parto de ĉiu individuo. Rememoru, kiel fanatike ĝoj-kriis amasoj da homoj salutante HITLERON. Kion kriis sovetiaj soldatoj atakante naziojn kaj pere-

ante sub tankoj? – “Je STALINO!” Kial oni tiel gloris lin antaŭ kaj eĉ iugrade post lia morto? Simplaj respondoj estis antaŭe preparitaj de la tiamaj sovetiaj ideologoj: “Li estas nia gvidanto”. Sed veraj respondoj al tiuj demandoj neniel estas simplaj – ilin oni serĉu en nia historio kaj... nia naturo.

Diktatoro estas pinto de la socio, sed diktatoretoj “sidas” en ĉiuj ĝiaj tavoloj. Dum la historio ĉiam estis same. En praepokoj, la gvidanto ĉiam estis la plej sperta, forta kaj sukcesa ĉasisto. Tiuj, kiuj sekvis liajn ordonojn, fruktodone allogis bizonon aŭ mamuton en bone kaŝitan kavon, kaj rezulte manĝis viandon. Gvidanto estis rezulto de rekta elekto de homoj kaj de la vivo mem. Li estis la homo, kiu efike prosperigis sian tribon. Poste, en prasocia memoro formiĝis la jena opinio: necesas elekti kiel gvidanton la plej bra-

van, kuraĝan, fortan homon, kaj tiam sukcesos ĉasado, milito ktp. Tiamaniere aperis faraonoj, reĝoj, caroj, militestroj ktp.

Ĉi tie ni sekvis logikan historian evoluon de la socio. Sed la socio ja konsistas el apartaj individuoj, kiuj, rigardante la gvidanton, volas fari la samon: gvidi, komandi, akiri postenon, riĉecon, potencon. Ĉiu (aŭ almenaŭ multaj) el ni estas iomete diktatorecaj, kaj ĉiu viva estaĵo en la naturo sekvas tiun ĉi skemon: faru same, kiel la plej forta, militema, decidema, kaj vi kun viaj familianoj prosperos, travivos kaj daŭrigos la senfinan ĉenon de generacioj.

Gvidanto aŭ gvidemulo?..

Sed en la socio laŭgrade ŝanĝiĝis la trajtoj de vera gvidanto, kiu per siaj saĝaj agoj kaj ordonoj vere direktis la socion al

prospero. Aperis malfortaj, fanfaronaj, malsaĝaj gvidemuloj, foje eĉ psike malsanaj, kiuj ne kapablis prizorgi la verajn popolarajn bezonojn, sed celis realigon nur de siaj propraj ambicioj kaj frenezaj revoj, sen naturaj kaj utilaj limoj. Rezulte aperis hitleroj, stalinoj, maŭoj, husejnoj ktp., kiuj turmentas proprajn popolojn kaj neniigas milionojn da homoj.

Tamen kial homoj gloras la diktatorojn kaj sincere ploras post ilia morto? La respondo estas delonge konata: ĉiu homo bezonas helpon, protekton, subtenon kaj “enmetas” siajn revojn en konkretajn “reprezentantojn de Dio sur la tero”. Krom tio, ĉiu homo en la profundo de sia animo deziras ankaŭ esti gvidanto, aŭ almenaŭ gvidanteto en sia rondo aŭ familio. Pripensu: ĉu vi ne volas vidi obeemon de viaj (ontaj) infanoj? Ĉu vi ne volus ĉesigi ilian emon

senlime moviĝi? Ho! Jen ankaŭ vi estas iomete diktatoreca, sed foje tio necesas por ilia edukado.

Milito: neevitebla produkto de homa racio

Same kiel diktatoreco, militoj aperas rezulte de evoluo de homa socio kiel rimedo akiri teritorion, manĝaĵojn, virinon por daŭrigi sian ekziston. Sed tiuj agoj ja estas direktitaj kontraŭ la aliaj homoj. Milito aperas, disvolviĝas kaj estas neevitebla produkto de homa "racio": bestoj havas ungegojn, kornojn, dentojn; homo inventis pafarkon, pafilon, atombombon...

Kara leganto, vi eble ekkrios: "Hej, aŭtoro, kien vi kondukas nin? Ĉu ĉiuj ni estas diktatoroj,



Preskaŭ 50 jarojn Kim Il Sung estis la gvidanto de Nord-Koreio; dum lia regado plenkreskuloj portis insignojn kun liaj portretoj kaj studis "gvidantologion" en universitatoj

kaj ĉu militoj estas neeviteblaj, ĉar tiuj ĉi fenomenoj kaŝiĝas en la radikoj de nia naturo?" Mia respondo estas "jes"... Sed ni estas nur iomete kaj nur iugrade diktatorecaj. Ni devas esti en bone difinitaj "kadroj de agresemo". Se ni ne komprenos kaj ne ekkonscios tion, ni neniam sukcesos konstrui efikajn programojn por bridi militemon, limigi ambiciojn, forigi agresemon, t.e. fari bone fiksitaĵojn kadrojn de niaj propraj naturaj ecoj. La kialo estas, ke ni daŭre (r)estas biologiaj estaĵoj, en kiuj estas kunfanditaj trajtoj de mamuloj kaj de pensantaj raciuloj, kiuj estas individuaj personoj kaj samtempe membroj de diversaj socioj (familia, triba, genta,

ŝtata). Do, tiu ĉi duobleco de nia naturo ĉiam estas kaŭzo de batalo inter racio kaj instinkto, inter penso kaj impulso. Elekti necesan vojon inter tiuj ĉi flankoj estas konstanta batalo kontraŭ si mem.

Kiel eviti la danĝeran vojon al diktatoreco? Necesas eduki infanojn tiel, ke poste dum sia tuta vivo ili plenumu la sanktajn leĝojn: ne murdu, ne ŝtelu, ne enviu, estu ĉiam honesta ktp. Kvankam niaj emocioj ĉiam malhelpas tiun ĉi taskon.

Ni provu en nia imago ŝanĝi la biologian naturon de homo – forigi sentojn kaj lasi nur racion. Tiam ni ricevus senaniman monstraĵon, kiu havus nek amon, nek kompaton, nek tenecon. Ĉu tia ĉi estaĵo estus perfekta?.. Diktatorecaj trajtoj sin kaŝas ne inter personaj emocioj, sed inter volo, ambicio, obstino kaj egoisma deziro, kiuj ofte de ekstere aspektas utilaj por plenumi socian rolon. Absolute racia homo povas esti eĉ pli kruela ol mallklera homo.

Multaj generacioj, zorgeme edukitaj por la nobla celo gvidi la popolon, dum popaŝa alproksimiĝo al la pinto de potenco, devas



En aŭgusto-septembro 1956 nur en Pekino, laŭ ordonoj de Maŭo, estis mortigitaj almenaŭ 1722 homoj, senigitaj de havaĵoj 33695 familioj kaj 397400 homoj estis ekzilitaj

purigi siajn vicojn kaj deflankigi tiujn, kiuj ne eltenas la ekzamenon de "akvo, fajro kaj triumfaj fanfaroj". Nur la plej indaj personoj povas okupi gvidajn postenojn en imperioj, landoj aŭ sur malpli altaj ŝtupoj de potenco. Devas ekzisti adekvata sistemo de klerigado, edukado kaj elektado por okupi ĉiujn ŝtupojn en la piramido de potenco per homoj, kiuj vere kapablas kaj indas esti gvidantoj. Sed tiu ĉi laboro postulos jarcentojn.

Kaj ne forgesendas, ke diktatoreco estas ne nur homa, sed ankaŭ socia trajto. Faru bonan socian, kaj diktatoreco malaperos per si mem en la profundeco de la historio!



FRANCO: en 1939 li estis deklarita dumviva reganto de Hispanio

Joel AMIS, Usono

Multaj homoj havas profundan emon esti iuspeca gvidanto, sed ĉu vere diktatoreco (aŭ almenaŭ gvidemo) estas baza homa eco? Nepre ne. Ekzistas ankaŭ multaj homoj, kiuj ne nur ne emas preni gvidajn rolojn, sed kiuj ankaŭ sentas sin tre malkomforte, se io devigas ilin ordoni aŭ eĉ instrukcii al aliaj homoj. Ja ekzistas diversaj personec-tipoj, kaj nur unu el ili emas gvidi aliajn homojn.

D-ro SCOTKIN starigas la demandon: "Ĉu vi ne volas vidi obeemon de viaj infanoj?" – kaj se oni jesas, tio signifas, ke oni estas iusenca diktatoro. Sed... ĉio dependas de la intencoj. Se iu patro aŭ patrino, kiu volas obeigi siajn gefilojn nur por pruvi al sia egoo sian povon (kaj bedaŭrinde ekzistas tro da tiaj), tiu gepatro ja estas diktatoreca – sed ankaŭ tute malmodela kaj malbona gepatro, laŭ mi. Bona gepatro volas, ke liaj/ŝiaj infanoj lernu kaj komprenu, kio estas bona konduto en homa socio – tial bona gepatro ne simple ordonas al siaj infanoj, sed ankaŭ klarigas la diferencojn inter bono kaj malbono, kaj kiel respekti aliajn homojn.

Prave, ke iuj homoj ploras post la morto de diktatoroj (ekzemple, post la morto de STALINO). Sed ĉu tio signifas, ke homoj "ŝatas" diktatorojn? Alivorte, ĉu tiuj homoj vere havas elekton? En totalisma socio la diktatoro regas ĉiujn aspektojn de la vivo kaj kredigas, ke li estas la dio, kiu savas la popolon de "la

Ĉu ni ĉiuj deziras esti diktatoroj?

malamiko". Tiuj homoj do povas kredi nenion alian, ĉar ili ja ne havis liberan aliron al informoj. Reiru ni al la gepatra ekzemplo: se eta infano havas perfortemajn gepatrojn, li aŭ ŝi tamen ploras, se li tuj perdos ilin – ĉar la infano konas nenion alian kaj la nekonata kutime estas por ni pli timiga ol la jam konata (eĉ se la jam konata realo estas koŝmara). Nur poste, kiam tiu infano vidas, kiel kondukas bonaj gepatroj, li aŭ ŝi ekkonscias pri la terureco de la antaŭa situacio. Kiom da homoj, kiuj ploris post la morto de STALINO, volus vidi lin ankoraŭ vivanta nun?

La artikolo krome preparolas nian "bestan naturon", t.e. nian naturan agresemon, kiu devas esti firme limigita. Bone, ni momente flankenlasu la spiritan flankon de homoj kaj konsideru homojn kiel simple specon de besto. Sed ĉu ie en la besta regno ekzistas anoj de iu specio, kiuj murdas siajn proprajn samspecianojn pro politikaj kialoj? Krome, eĉ ne ĉiuj specioj de bestoj emas havi "gvidantojn" kaj "subulojn". Ni prenu plej konatajn ekzemplojn: hundojn kaj katojn. Ĉu vi iam scivolis, kial hundoj bezonas severan trejnadon por bone kunvivi kun homoj, dum katojn oni eĉ kun grandaj klopodoj ne povas trejni, sed ili tamen bone kunvivas kun homoj? La respondo estas jena: hundoj organiziĝas laŭ hierarkia modelo, do

aŭ la homa mastro devas fariĝi la "estro", kiu subigas la hundon, aŭ la hundo fariĝos ties estro. Aliflanke, katoj emas al memstareco, do ili nek akceptas estrojn, nek volas fariĝi estro de la homo – ili emas kunvivi kiel egaluloj. Do, eĉ se konsideri homojn nur kiel bestojn, tio ne 100%-e pruvas, ke "diktatoremo" estas neevitebla parto de nia naturo.

Laŭ mi, diktatoremo fontas unuavice el baza malagnosko de la ideo, ke ĉiu homo vivo estas sankta. La ideo, ke ĉiu homo estas valora kaj posedas en si iom da dieco, estas la vera bazo de demokratio. Sed homoj ja estas malperfektaj. Do ekzistas homoj kun troa ambicio, egoismo, avareco ktp. Pro tio, homo neniam povas esti super homoj, kaj unusola homo (t.e. diktatoro aŭ monarĥo) ne povas esti libera de malperfektaĵoj. Tial en demokratio necesas la supereco de la leĝo – leĝo, kiu devenas de la komuna volo de la popolo kaj al kiu devas submetiĝi ĉiu, ĉu riĉa, ĉu malriĉa. Diktatoroj foje ŝajnas eĉ bonegaj homoj komence – sed, kiel oni diras, "absoluta povo koruptas absolute". Do jes, foje en totalisma aŭ monarĥia sistemo povas aperi bonegaj regantoj – sed kiu sekvos? Ĉu pli bona aŭ malpli? Jes, en demokratio oni ofte devas

kontentiĝi je mezbonaj gvidantoj – sed la popolo almenaŭ havas la okazon poste elĵeti tiujn.

Do, kiel forigi diktatorecon por ĉiam? Kvankam la tezo "generacion post generacio eduki homojn por la nobla celo gvidi la popolon" estas tre nobla, ĝi tamen neniel gardas kontraŭ homa malperfekteco. La nura sistemo, kiu povas vere protekti la rajtojn kaj liberecojn de ĉiu homo, estas demokratio bazita sur la baza kompreno, ke ĉiu homo estas sankta kaj suverena. Ni vidis (kaj vidas ankoraŭ nun), kiel facile diktatoroj kaj totalismaj reĝimoj prosperas en landoj sen demokratia tradicio. Vere necesas nutri la semojn de demokratio, ne simple en la politika sfero, sed ankaŭ en la homaj mensoj. Se homoj ankoraŭ kredas je la supereco de iu grupo super la alia, demokratio ne povas plene enradikiĝi. Sed, eĉ kiam regas demokratia idealo, nedemokratiaj sentoj, ideoj kaj personoj ja aperas. Pro tio neniam eblas konfidi la regadon super aliaj suverenaj homoj al unu persono kun absoluta povo. Necesas la supereco de leĝo kaj la malefikeco (ne miru!) de demokratio – ja malrapida, malefika demokratio povas malpli rapide kaj malpli efike senigi homojn je iliaj rajtoj ol absoluta diktatoreco.

Teologio + marksismo = ???

Calvin Carver

La liberigteologio (el la hispana “la teología [teoloĥia] de la liberación”) estas mikso de religia kredo kaj socia agado, kiu jam de tridek jaroj havas aparte gravan influon sur la politikon de Centra Ameriko.

La liberigteologio: kio ĝi estas?

Dum la 1950aj kaj ’60aj jaroj, tiu ĉi movado kreskis en la Rom-Katolika Eklezio en Ameriko, kiu rimarkis grandajn mankojn en la tradicia agado de la Eklezio al malriĉaj indiĝenaj kamparanoj – la plejmulto de la loĝantaro. Al multaj homoj ŝajnis blasfeme daŭre paroladi pri la spiritaj bezonoj de la homaro, dum la Eklezio neglektas ilian materian bonfarton. Pastroj, kiel argentinano Lucio GERA, perua jezuito Gustavo GUTIERREZ kaj brazilano Leonardo BOFF komencis publike kritiki la katolikajn instancojn, regantajn el Eŭropo, kaj pledi por pli justa traktado. En 1971 GUTIERREZ verkis la libron *La teología de la liberación*, kiu prezentis la novan koncepton al la publiko en zorge sistemigita formo.

La rezultanta teologio ofte uzas marksismon kiel ilon por priskribi la rilatojn inter riĉuloj kaj malriĉuloj; de tiu ekonomia teorio venas ankaŭ kelkaj specialaj terminoj. Sed malgraŭ iuj subtenantoj de marksismo en la movado, multaj teologoj tamen kontraŭstaras la tradician marksismon pro ĝia ateismo.

Dum multaj jaroj, la nova teologio prezentis funkciantan rimedon kontraŭ la diktatorecoj de Ameriko. Kvankam diktatoroj povis forviŝi sindikatojn, liberan gazetaron kaj politikajn partiojn, ili ĝenerale estimis la Eklezion. Protektite de tradicio, malriĉaj kristanoj disvolvis lokajn “bazajn komunumojn”, en kiuj eblis diskuti progresemajn ideojn kaj kreskigi opoziciojn.

Paca agado...

Por milionoj da kristanoj, la plej estimata reprezentanto de la liberigteologio estis Oscar [oskar] ROMERO, ĉefepiskopo en Salvadoro. La altaj instancoj de la Eklezio en tiu lando historie akceptis la diktatorecon, sed la murdo de kolega sacerdote fare de registara bando igis ROMERON pli atenti la bezonojn de kamparanoj. Li parolis al la lokaj kristanoj pri ilia praveco kaj pri la misa vojo de la registaro, kaj eĉ pledis (sen-sukcese) al usona prezidento Jimmy CARTER [ĝimi kartr], ke Usono ĉesu finance subteni la registaron. En sia lasta prediko ROMERO diris al la armeo:

“Fratoj, vi estas de nia sama popolo, vi mortigas viajn proprajn fratojn – kamparanojn, kaj antaŭ ordono por mortigi, kiun donas homo, devas superregi la leĝo de Dio, kiu diras “Ne mortigu”. Neniu soldato estas devigita obei ordonon kontraŭ la leĝo de Dio. Leĝon malmoralan neniu devas plenumi. La Eklezio, defendanto de la rajtoj de Dio, de la homa digneco, de la persono, ne povas resti silenta antaŭ tiu abomena afero. Al vi mi pledas, mi petegas, mi ordonas je la nomo de Dio: ĉesu la subpremon.”

Tiaj vortoj tamen havis siajn konsekvencojn. La postan tagon, la 24an de marto, 1980, ROMERO estis mortpafita dum li prezidis meson.

...kaj ne tiel paca

ROMERO estis humila homo, kiu neniel intencis manipulasi politikon, sed simple pledis por paco kaj justeco. Tamen, por la averaĝa

homo, la termino “liberigteologio” eble rememorigas pri malpli paca agado, nome la eklezia rolo en la interna milito en Nikaragvo en la 1980aj jaroj. Kiam la Sandinista marksisma partio sukcesis renversi la reĝimon de diktatoro SAMOZA, pluraj sacerdotoj subtenis la novan registaron kaj volis perforte plenumi siajn ideojn pri ideala socio. Ĉefe rolis Ernesto CARDENAL [kardenal] (ankaŭ fama poeto) kiel ministro pri kulturo kaj Miguel D’ESCOTO kiel ministro pri eksterlandaj rilatoj.

Kvankam multaj homoj havis esperon, ke la nova politika situacio alportus liberecon kaj trankvilon al longe subpremata lando, la rezulto estis mala. Sandinistaj soldatoj senigis je tero kaj du fojojn amase



Oscar ROMERO

greso kaj justeco” kiel “danĝeran komunismon”.

Novaj direktoj

Liberigteologio ekestis inter malriĉuloj de Centra kaj Suda Ameriko, sed anoj de aliaj popoloj kaj sociaj klasoj daŭrigis la koncepton. Jam en 1968 James H. CONE [ĝejmz koun] komencis verki pri liberigteologio por la nigrujoj de Usono, ofte viktimoj de rasismo. Kristanoj en la “dalit”-klaso de Barato, historie la plej malalta laŭ la hinduisma kastosistemo, dum pasintaj jaroj evoluigas sian propran version de liberigteologio. Hodiaŭ ekzistas liberigteologioj eĉ ĉe feministoj kaj sameksmuloj.

Nun ekzistas multaj skoloj, kiuj havas malsamajn ideojn pri agado. Tamen la bazaj principoj de liberigteologio ĉiam restas la jenaj: strebi al la bezonoj de individuaj kredantoj, kontraŭstari hierarkion kaj pompan tradicion kaj aktivi en la socio.



Ernesto CARDENAL

mortigis indiĝenajn popolojn – internaciaj grupoj pri homaj rajtoj, ekz. *Amnesty International* [emnisti interneŝnel] (*Amnestio Internacia*) raportis pri torturo kaj abomenindaj loĝkondiĉoj en politikaj malliberejoj.

Estis granda ironio, ke movado por liberigo fakte rezultigis subpremon kaj ĥaoson. Pro la malbona ekzemplo de Nikaragvo, Vatikano kaj Usono malfidis ĉiujn kamparanajn movadojn “por pro-



...sed ĉu ili pensas pri la bezonoj de malriĉuloj?

La potenculoj konstruas pala-cojn kaj preĝejojn....

Kapinga Ntumba, Demokratia Respubliko Kongo/Zimbabvo

Ĉio komenciĝis la 25an de oktobro 1996, kiam Banjamulenge* atakis mian vilaĝon. Mi devis fuĝi al mia onklo en la proksima urbo Uvira, sed... La venonta tago ankaŭ Uvira estis atakita... Ĝis nun restas en mia memoro tiu tago – la 25a de oktobro, la 9:00 matene laŭ la loka tempo... Tiam mi kaj miaj familianoj, kune kun aliaj homoj, sen havaĵoj, sed tamen kun espero, devis fuĝi. Ĉu ni savos niajn vivojn aŭ ne? Tiam ni ne povis respondi tiun ĉi demandon...

La plej proksima lando al Uvira – Burundio, nur 25 kilometrojn for – tiam estis sub la regado de tucioj. Mi ne povis iri tien sen danĝero esti mortigita kaj decidis iri en Tanzanion. Sed por atingi ĝin oni devas iel transiri Tanganjikon. (Tiu grandega lago, kiu kovras 34 mil kv. km kaj profundas 1470 metrojn, estas natura land-limo inter Kongo, Tanzanio, Burundio kaj Zambio.) Mia lando estis en la interna milito, kaj fuĝi per-boate eblis nur ĉirkaŭ 200 km for de Uvira – apud Fizi (la milito ankoraŭ ne atingis ĝin).

Fizi estis plena de homoj, kiuj – same kiel ni – bezonis boatojn por iri al pli sekura sen-milita parto de Kongo aŭ eksterlanden. Sed... Jen “bonega” ekzemplo de tio, kiel aĉetemo grandigas vendemon – la transport-kostoj pliiĝis de la kutimaj 25 USD al 50...

Ni, kompreneble, ne havis tiom da mono. Do, la sola eblo, kiu restis al ni, same kiel al multaj aliaj – pied-iri ĉirkaŭ 800 km ĝis alia haveno – Kalemi, el kiu eblis fuĝi. Post precize 11 tagoj ni alvenis... Bedaŭrinde, ne estis mono por ke ĉiuj miaj familianoj pagu por la transporto. Do, estis decidite, ke mi sola foriru, ĉar ĝuste gejunuloj estas la ĉiama celo de la militantoj... Last-momente mi ŝanĝis mian decidon iri al proksima Tanzanio – ĝi jam estis plen-plena de aliaj kongaj rifuĝintoj. Mi sciis, ke la kondiĉoj tie estas apenaŭ el-teneblaj, do, mi direktis min al malpli proksima Zambio. Tien mi alvenis nur la 23an de novembro 1996.

Sed nur la 6an de decembro mi alvenis al la rifuĝejo, kiu estis en nord-okcidenta Zambio – ja eĉ post **registriĝo** ĉe la zambiana registaro mi devis pasigi semajnon en loka malliberejo. Zambio ŝajnis al

mi tute alia mondo, des pli ke “mia” rifuĝejo, same kiel multaj aliaj rifuĝejoj en afrikaj landoj, troviĝis en arbaro. Tie mi trovis rifuĝintojn el Angolo, kiuj loĝis en ĝi... ekde 1971 (!). Ni ne povis facile komunikiĝi, ĉar mi ne parolis iliajn lokajn ligvojn, nek la portugalan. Mi povis paroleti nur kun iliaj infanoj, kiuj naskiĝis jam en Zambio kaj iomete scipovis la anglan. Tio estis mia sola **avan-**

luj iris al la oficistoj de UNHCR** kun la peto venigi ilin en alian urbon de Kongo, kie milito ankoraŭ ne komenciĝis.

Tamen, mi decidis ne riski mian vivon kontraŭ-leĝe tra-vojaĝante multajn landojn. Do, malgraŭ ĉio, mi restis en la rifuĝejo. Sed estis tie ankaŭ bonaj aferoj – dank’ al **misiistoj**, ekzemple, ni povis sendi leterojn.

En septembro 1997 la milito finiĝis, kaj multaj miaj samlan-

preneble forĝis pri miaj studoj kaj fariĝis gardo-staranto.

Post unu jaro, kiam la organizo malfermis bibliotekon, oni **promociis** min – tiel mi fariĝis bibliotekisto. Kaj tio vere malfermis aliajn vojojn. Mi povis amikiĝi kun misiistoj, kiuj ĉiam helpis min; mi ankaŭ lernis la portugalan kaj multe plibonigis miajn viv-kondiĉojn. Krome, mi zorgis pri la loka poŝt-oficejo, laboris kiel tradukisto (franca-angla) kaj faris multajn aliajn laborojn.

Decembre 2001 estis tempo foriri de la rifuĝejo. Malgraŭ la pli bona laboro kaj kondiĉoj, la rifuĝejo troviĝis ja en arbaro, kie simple ne estis io alia. Kaj mi ja pasigis kvin jarojn tie! Ekde januaro 2002 mi loĝas en Harare (Zimbabvo). Alveninte tiun urbon, mi komprenis, ke mi devas denove ĉion lerni – ja la vivo en ĉiuj lokoj tre malsimilas. Sed restis ĉe mi revo, kiu eble eĉ neniam plenumiĝos – iam daŭrigi miajn studojn. Mi esperas, ke ankoraŭ ne estas tro malfrue, kaj ke Dio iam malfermos al mi novajn vojojn.

Sed kiam mi mense revenas al ĉiuj miaj tra-vivaĵoj, mi komprenas, ke estis ankaŭ multaj bonaj aferoj en tio. La vivo en la rifuĝejo helpis al mi fariĝi **pacienca** kaj **tolerema**; al-kutim-iĝi al ĉiuj situacioj kaj kontaktiĝi kun diversaj homoj, precipe kun misiistoj, kaj tiel plibonigi mian scipovon de la angla. Tie mi vere **maturiĝis**. Kiel oni diras, estas neniu perdo sen gajno!


* Banjamulenge – grupo da ĉ. 300 mil tucioj (afrika tribo), kiuj devenas de Ruando, sed en la 18a j.c. translokiĝis en la teritorion de la nuna D.R. Kongo.

**United Nations High Commissioner for Refugees [junatjed neŝenz haj komiŝinr for refjuĝijz] – Alta Komisiito de Unuiĝintaj Nacioj pri Rifuĝintoj (vd. p.8-9).

Kvin jaroj en la rifuĝejo



Kiam la milito finfine finiĝos?..



taĝo – ja multaj aliaj miaj samlandanoj ne parolis ĝin. Multaj kongolandanoj cetere ne eltenis la vivon tie; pluraj el ili decidis serĉi sian feliĉon en Lusako – la ĉef-urbo de Zambio – aŭ en Sud-Afriko. Tiuj, kiuj ne havis monon, devis vendi siajn kovrilojn, manĝilaron ktp. – ĉion, kion ili ricevis de la prizorgantoj de la rifuĝejo. Mi vidis, kiel aliaj kongolandanoj alvenis kaj tuj foriris pro la teruraj viv-kondiĉoj.

danoj revenis hejmen. La situacio tamen ankoraŭ ne estis **stabila**, kaj mi decidis atendi iomete. La “ĉielo falis”, kiel oni diras en mia lando pri grandega bon-ŝanco, en oktobro 1997. Tiam la ĉefo de la katolika organizo dungis min kiel **gardo-staranton**. Tiun proponon mi ne povus nei, ĉar mi ja ege bezonis monon (mi eĉ ne havis poŝtmarkojn por sendi leterojn al miaj familianoj). Mi kom-

avantaĝo – tio, kio donas super-econ

fuĝi – forkuri por savi sin

gardi – zorgi pri la sekureco

maturiĝi – fariĝi vere plenkreska (ne nur korpe, sed ankaŭ mense)

misiisto – homo sendita eksterlanden por dis-vast-igi sian religion kaj helpi al lokanoj

pacienca – tiu, kiu trankvile el-tenas malbonon

promocii – doni pli altrangan labor-lokon

registriĝo – en-skrib-igo

rifuĝinto – tiu, kiu fuĝis

stabila – ne facile ŝanĝiĝema

tolerema – tiu, kiu ne kontraŭ-staras al io, eĉ se ĝi malplaĉas

Rifuĝintoj en Britio, aŭ: Kiel

Elisabetta CIRIO, Britio

Mi mem estas nek azilpetanto nek rifuĝinto. Mi estas unu el tiuj bonŝanculoj, kiuj naskiĝis en Eŭropo, havas la ŝancon libere loĝi kaj labori en ĉiuj EU-landoj kaj relative facile akiri vizon por vojaĝi ekstereŭrope. Krome, mi loĝas en stabila kaj sufiĉe demokratia lando, libera de militoj aŭ grandaj katastrofoj – do mi ne bezonas ien forkuri. Mia sperto pri la mondo de rifuĝintoj komenciĝis en la jaro 2001, kiam mi ekaktivis universitate en la asocio *Studenta Agado por Rifuĝintoj* (angle: *Student Action for Refugees* [stjudent ekŝn for refjuĝijz]). Tuj poste mi enposteniĝis kiel oficisto en bonfara organizo de kaj por azilpetantoj kaj rifuĝintoj, kie mi laboris ses monatojn. Nun mi verkas universitatan disertacion pri enmigraj leĝoj en Britio. Krome, mi ĉiutage renkontas rifuĝintojn en mia kvartalo, kaj multaj el ili cetere estas miaj geamikoj.

kaj fondis NASS (*Nacia Helpa Servo por Azilpetantoj*, angle: *National Asylum Support Service* [neŝenl asajlum saport servis]), kiu nun prizorgas ilian loĝadon kaj bazajn vivkostojn. La helpmono pagata al azilpetantoj de NASS estas eĉ pli eta, ol la baza ŝtata helpmono pagata, ekzemple, al senlaboruloj. Krom ĉio alia, azilpetantoj ne rajtas labori, do ili restas dependaj de la ŝtata helpo – pro tio multaj el ili laboras kontraŭleĝe kaj en malbone pagataj laborpostenoj.

Antaŭe, multaj azilpetantoj alvenis kaj restis en Londono aŭ en la sud-orienta parto de Britio, kaj tio kaŭzis malekvilibron en la respondeco pri ili en aliaj regionoj. Pro tio, NASS decidis efektiviĝi t.n. sistemon de “dispersado”. Tio signifas, ke oni sendas azilpetantojn al pluraj regionoj de Anglio, Skotio kaj Kimrio, kaj se oni rifuzas translokiĝi, oni perdas la rajton je ŝtata helpmono kaj devas mem pagi sian loĝadon. Foje

Kio estas la diferenco inter “rifuĝinto” kaj “asil-petanto”? Laŭ la Ĝeneva Konvencio de 1951:

Rifuĝinto estas tiu, kiu havas evidentan timon de persekutoj pro raso, religio, nacieco, aparteno al iu socia grupo aŭ politika opinio; li/ŝi estas for de sia lando kaj ne povas aŭ ne volas reiri hejmlanden pro timo de persekutoj.

Azilpetanto estas tiu, kiu petis azilon (t.e. petis, ke li/ŝi estu rekonita kiel rifuĝinto) kaj atendas tiun decidon de la registaro de la lando, kie li petis azilon.

kaj infanoj alvenis Brition kaj petis azilon. Sinjoro F. ne sciis, kie troviĝas lia familio kaj petis nian organizon trovi ilin. Ni kontaktis multajn organizojn kaj finfine eksciis, ke lia familio troviĝas en NASS-loĝejo en Manĉestro – norda Britio. Sekve, ni kontaktis NASS-on petante, ke la familio estu loĝigita kune – en Manĉestro aŭ Birmingamo. NASS konsentis, tamen... kiam Sinjoro F. alvenis al ilia oficejo, evidentiĝis, ke lia familio estis forpuŝita aliloken, kaj la loĝejestroj de sinjoro F. en Birmingamo ne pretis ricevi kaj loĝigi ilin! Kaj tio estas nur unusola ekzemplo de la pluraj fuŝaĵoj de tiu ĉi sistemo.

Kiam oficistoj supozas, ke azilpetantoj mensogas kaj estas nur laborserĉantoj, aŭ kiam ili venas el “sendanĝeraj landoj”, tiam ili estas senditaj rekte al t.n. “detencentroj” (specoj de malliberejo). Kaj se azilo estas rifuzita, oni estas deportataj en sian hejmlandon.

FAKTE

UNHCR (<www.unhcr.ch>, *United Nations High Commissioner for Refugees* [junajted neŝenz haj komiŝinr for refjuĝijz] – Alta Komisiito de Unuigintaj Nacioj pri Rifuĝintoj) estas UN-agentejo pri rifuĝintoj. Ĝi estas organizo, kiu protektas kaj helpas rifuĝintojn kaj aliajn homojn, kiuj estis forigitaj de siaj loĝlokoj aŭ bezonas helpon. Tio inkluzivas rifuĝintojn; azilpetantojn; rifuĝintojn jam revenintajn hejmen, sed kiuj daŭre bezonas rekonstrui siajn vivojn; lokajn komunumojn, influitajn de rifuĝado; senŝtatajn homojn kaj la kreskantan nombron de t.n. “interne delokitaj homoj” – tiuj, kiuj devis foriri de sia hejmo, sed kiuj ne atingis najbaran landon kaj tiel, malsame de rifuĝintoj, ne estas protektitaj de la internacia juro kaj do ne rajtas ricevi helpon. La tuta nombro de personoj, pri kiuj zorgas UNHCR, en la komenco de 2004, estas **pli ol 17 milionoj**. Tio estas tri milionoj malpli ol en la pasinta jaro. (Ĉiuj datumoj en la tabeloj estas de UNHCR; estas indikitaj nur la unuaj dek lokoj. La tabeloj sen jarindikoj rilatas al la jaro 2003; laŭ la datumoj de la unua de januaro 2004)



Foje la sola eblo travivi estas... fuĝi eksterlanden



Laŭ la funkciuloj de la brita registaro, enmigro kaj serĉo de politika azilo estas grandaj problemoj. Ene de 11 jaroj la registaro ŝanĝis kvin leĝarojn (en 1993, 1996, 1999, 2002 kaj 2004), kiuj paŝon post paŝo limigis la rajtojn de azilpetantoj. Ekzemple, ĝis la jaro 1999 ili havis la samajn rajtojn je socia helpmono, publikaj apartamentoj kaj servoj, kiel iu ajn brita civitano. Poste oni forprenis tiujn eblojn

homoj estas translokitaj plurfoje – pro tio ili ĉiam restas izolitaj, sen regula kontakto kun geamikoj aŭ komunumoj, kiujn ili havis en la antaŭa loĝloko. Ofte oni eĉ ne povas daŭrigi studadon... Okazas foje eĉ apartigoj disde la propraj familioj! Jen “viva” ekzemplo: sinjoro F. venis el Angolo. Li petis azilon en Britio kaj loĝis en NASS-loĝejo en Birmingamo. Post unu monato lia edzino

Homoj, pri kiuj zorgas UNHCR

Regiono	2002	2003
Azio	9 378 900	6 187 800
Afriko	4 593 200	4 285 100
Eŭropo	4 531 500	4 242 300
Nord-Ameriko	1 061 000	978 100
Latin-Ameriko kaj Kariba regiono	1 047 200	1 316 400
Oceanio	79 100	74 400
Entute	20 690 900	17 084 100



Interne delokitaj homoj: ilia nombro estas pli ol 20 milionoj!

unu leĝo kontraŭas la alian



Multkulturaj budoj dum Semajno de Rifuĝintoj



KOMPLEZE DE E.C.

Brita politikistino kun grupo de rifuĝintoj, kiuj organizis bicikladon por kolekti monon por infan-malsanulejo

Iom post iom, pere de nova leĝaro, la brita registaro provas limigi la rajtojn de azilpetantoj je sindefendo en kortumoj. Antaŭe, se la unua kortuma decido estis negativa (t.e. se la kortumo decidis, ke azilpetanto ne kvalifikiĝas kiel rifuĝinto aŭ ne eniras apartan azilkategorion kaj do

decido, kiu fakte donas al azilpetanto la statuson de rifuĝinto, NASS subtenos lin/ŝin ankoraŭ 28 tagojn. Post tio, rifuĝinto rajtas je ordinara ŝtata helpo. Same kiel britoj, li/ŝi ricevos ŝtatan helpmonon por senlaboruloj aŭ tuj povos labori. Tamen, ekzistas unu granda "sed": por ricevi tiun

Interne delokitaj homoj, pri kiuj zorgas UNHCR*

Lando	Nombro
Kolombio	1 244 100
Azerbajĝano	575 600
Liberio	531 600
Srilanko	386 100
Rusio	368 200
Bosnio kaj Hercegovino	327 200
Kartvelio	260 200
Serbio kaj Montenegro	256 900
Afganio	184 300
Ebura Bordo	38 000

* Ila ĝenerala nombro estas ĉ. 20-25 milionoj

plika kaj ofte ŝanĝiĝas. Pro tio, multaj agentejoj, kiuj okupiĝas pri la servoj por rifuĝintoj, ne bone konas novajn leĝajn regularojn kaj donas malĝustajn informojn, aŭ entute rifuzas doni bezonatajn servojn.

Sed krom multaj malbonaj ekzemploj ekzistas ankaŭ kelkaj bonaj. Junie en Britio okazas publika Semajno de Rifuĝintoj, kiam estas organizataj diversaj eventoj por plialtigi la intereson de la brita loĝantaro pri la problemoj de rifuĝintoj, diskonigi iliajn kulturojn, informi pri la pozitivaj kontribuoj de rifuĝintoj al la brita socio kaj doni la ĝustajn informojn pri la situacio de azilpetantoj. Tiuj ĉi eventoj estas vere multkulturaj. En Birmingamo ĉiuj rifuĝint-komunumoj de la urbo estas invitataj prezenti sian muzikon, landon, lingvon sur bunta scenejo sur la centra placo. Estas budoj el pluraj landoj, etnaj manĝaĵoj, ludiloj por infanoj, teatraĵoj kaj muzikgrupoj.

Rifuĝintoj: 9,7 milionoj

Devenlandoj	Ĉefaj azillandoj	Nombro
Afganio	Pakistano, Irano	2 136 000
Sudano	Ugando, Ĉadio, Etiopio, Kenjo, D.R.Kongo	606 200
Burundio	Tanzanio, D.R. Kongo, Zambio, Sud-Afriko	531 600
D.R.Kongo	Tanzanio, Kongo, Zambio, Burundio, Ruando	453 400
Israelo (palestinanoj)	Saud-Arabio, Egiptio, Libio, Alĝerio	427 900
Somalia	Kenjo, Jemeno, Britio, Etiopio, Ĝibutio, Usono	402 200
Irako	Irano, Germanio, Nederlando, Svedio, Britio	368 500
Vjetnamio	Ĉinio, Germanio, Usono, Francio	363 200
Liberio	Gvineo, Ebura Bordo, Sieraleono, Ganao, Usono	353 300
Angolo	Zambio, D.R. Kongo, Namibio, Sud-Afriko	329 600

ne rajtas resti en Britio), azilpetanto havis du eblojn por apelacii sen neceso pagi advokatojn. Dum la lasta jaro, oni malpligrandigis la ŝancojn pri apelacio: nun oni povas senpage apelacii nur unu fojon, kaj en kelkaj kazoj oni ne povas tion fari entute.

Foje la novaj azilaj kaj enmigraj leĝoj kontraŭas la jam ekzistantajn. Aparte famas la kazo pri la Sekcio 55 de la Akto pri Azilo, Enmigrado kaj Nacieco (2002). Tiu sekcio forprenis la rajton de azilpetantoj je ŝtata helpo, se ili ne petis azilon tuj post sia alveno en Brition. Do, se ili atendis kelkajn tagojn post la alveno, ili ne plu rajtis je ŝtata mono por loĝejo kaj vivkostoj. Sed multfoje la kaŭzo de tio estis timo, nekono de britaj leĝoj aŭ de la angla lingvo. Feliĉe, la Apelacia Kortumo tamen decidis, ke tiu leĝo kontraŭas la Deklaron pri Homaj Rajtoj, kaj ĝi finfine estis nuligita. La brita registaro tamen intencas apelacii kontraŭ tiu ĉi decido.

Sed la situacio ne tuj pliboniĝas, kiam la azilpetanto finfine ricevas la rajton resti en Britio kiel rifuĝinto. Post la kortuma

ŝtatan helpon aŭ trovi laboron, oni bezonas apartan dokumenton ("NASS 35"), sed kutime NASS ege malrapide preparas ĝin. Do, ofte okazas, ke la rifuĝintoj unuflanke ne plu havas loĝejon aŭ monhelpon de NASS, sed aliflanke ne povas havi ordinaran helpmonon, ĉar ili ankoraŭ ne havas la necesan dokumenton.

La azilsistemo en Britio estas vere kom-

Azilpetantoj: 985 500

Azillandoj	Devenlandoj	Azilpetoj
Britio	Somalia, Irako, Ĉinio, Zimbabvo, Irano, Turkio	61 100
Usono	Ĉinio, Kolombio, Meksiko, Haitio, Indonezio	60 700
Francio	Turkio, Ĉinio, D.R. Kongo, Rusio, Alĝerio	59 800
Germanio	Turkio, Serbio kaj Montenegro, Irako, Rusio, Ĉinio	50 600
Aŭstrio	Rusio, Turkio, Barato, Serbio kaj Montenegro, Afganio	32 400
Kanado	Pakistano, Meksiko, Kolombio, Ĉinio, Kostariko	31 900
Svedio	Serbio kaj Montenegro, Somalia, senŝtataj, Irako, Bosnio kaj Hercegovino	31 300
Svisio	Serbio kaj Montenegro, Turkio, Irako, Alĝerio, Kartvelio	20 800
Belgio	D.R. Kongo, Rusio, Serbio kaj Montenegro, Irano, Kamerunio	16 900
Norvegio	Serbio kaj Montenegro, Afganio, Rusio, Somalia, Irako	16 000
Nederlando	Irako, Irano, Afganio, Somalia, Liberio	13 400
Ĉeĥio	Rusio, Ukrainio, Slovakio, Ĉinio, Vjetnamio	11 400
Slovakio	Rusio, Barato, Ĉinio, Armenio, Afganio	10 400

“Sukceso de nia entreprenado dependas de tio, kiel bone ni komprenas niajn komerc-partnerojn”



FOTO: KRISTINA SPERKOVA
Sabine McKinnon dum la TEJO/EGTYF-seminario pri projektmastrumado en Strasburgo

Sabine McKinnon estis unu el la prelegantoj de la lasta TEJO-seminario*, kaj ŝia prelego – sentroige! – estis unu el la plej sukcesaj dum la tuta sesio. Sabine ellaboris propran kurson pri interkultura komunikado kaj instruas en Universitata Kolegio de Reĝino Margareto (*Queen Margaret University College Edingurgh* [kūijn margaret juniversiti koleĝ edenbora]) – ŝtata universitato en Britio. **KONTAKTO** ne povis maltrafi la okazon intervjui ŝin! Ni aldonu, ke Sabine estas germanino, loĝas en Britio (Skotlando) kaj havas 25 jarojn da instruista sperto.

“Ni ne ŝanĝas niajn stereotipojn, sed “ŝanĝas” en nia menso la personon mem, kiu ne kongruas kun ili”

– Sabine, kiel okazis, ke vi ekinteresiĝis pri interkulturaj aferoj?

– Tio okazis tute nature. Mi devis mem multon lerni kiel homo loĝanta eksterlande (mia edzo estas skoto). Mi komprenis, ke interkulturaj problemoj aperas ĉiutage, kaj ĝuste tiu ĉiutage “interkultura lukto” naskis en mi grandan intereson pri tiu ĉi fenomeno. Do, unuavice tio okazis pro personaj kialoj. Jen ekzemplo: foje unu el miaj britaj kolegiroj diris al mi: “Vi fariĝis tre brita!” – “Kial?” – mi demandis, ĉar mi tute ne konsideras min “tre brita”. Ŝi respondis: “Vi estas tute malstreĉita kaj havas humursenton!” Mi estis vere surprizita, sed ŝi tute senŝerce intencis esti afabla al mi! (*ridetas*)

– Eble ŝi supozis, ke germanoj estas ĉiam streĉitaj kaj havas neniom da humursento...

– Ĝuste! Laŭ ŝia kompreno, ili neniam ridas nek amuziĝas. Kaj se iu germano (“kia hazardo!”) havas humursenton, li, laŭ ŝi, tute ne povas esti “germano”. En mia kazo, ŝi ne ŝanĝis siajn stereotipojn – ŝi nur “transmetis” min en la britan “keston”! Homoj

tion faras tre ofte: ni ne ŝanĝas niajn stereotipojn, sed “ŝanĝas” en nia menso la personon mem, kiu ne kongruas kun ili.

Jen alia situacio. En komerc-kurso de nia universitato studis junulino el Tajvano. La universitato proponas diversajn lingvajn kursojn – italan, germanan, francan ktp. Por neanglalingvanoj ili ne estas devigaj, sed tiu knabino ial volis fari la germanan kurson. Mi klarigis, ke ŝi *ne devas* tion fari, kaj eble estus bone por ŝi pli multe studi la anglan. Ŝi respondis nenion, sed simple... ekploris! Mi estis ŝokita. Ŝi simple komprenis miajn vortojn kiel “vi ne estas sufiĉe inteligenta por la germana”. Kompreneble, mi tuj aldonis: “Vi ja tamen rajtas studi la germanan, se vi volas”. Rezulte, ŝi estis la plej bona studentino, kiun mi iam ajn havis! Tamen ŝi neniam dirus, kion ŝi vere sentis, nek demandus... Mi ja estis en la “pli alta” instruista posteno, kaj en Tajvano oni ne demandas nek kritikis instruistojn. Similaj situacioj povas okazi ankaŭ al ĉiu el ni, kiam ni estas ekster nia kutima medio. Eĉ ene de Eŭropo estas multaj interkulturaj diferencoj...

“Via vizaĝo estas terura!”

– Ĉu ankaŭ al vi okazis io simila?

– Jes, plurfoje. Ekzemple, en Germanio estas tute normale diri: “Vi ne aspektas bone hodiaŭ”. Tio povas esti esprimo de zorgo, alivorte: “Ĉu vi fartas bone? Kio okazis? Mi maltrankviliĝas...” Se oni diras ion similan en Britio, oni miskomprenos. Iam mi diris ion tian al mia koleginino. Ŝi kun indigno respondis: “Ankaŭ VI ne aspektas tiel bone!” Ŝi vere estis tre ofendita... Sed eĉ pli terura situacio okazis al mia germana konatino. Ŝi ne bone posedis la anglan, kaj foje ŝi diris al sia angla kunlaborantino: “Via vizaĝo estas terura!” Ŝi nur volis esprimi sian zorgon, sed sonis tute male... Bonŝance, mi ĉeestis kaj klarigis tiun miskomprenon. Tiuj situacioj okazas des pli ofte, se iu ne bone scipovas la lingvon aŭ ne komprenas ĝiajn subtilaĵojn. La angla lingvo (des pli, la brita angla) estas ja ege subtila.

– Sed kiel okazis, ke vi fariĝis profesia instruistino pri interkultura komunikado? Kio “puŝis” vin proponi interkulturajn kursojn?

– Dum longa tempo mi estis (kaj daŭre estas) instruistino pri la germana lingvo kaj pri eŭropa politiko. Sed nia universitato ne celas la germanan kiel la ĉefan studobjekton – studentoj lernas ĝin kiel parton de iu alia kurso – lingvistiko, turismo ktp. Do, ili ne emas lerni ion, kio kaŝiĝas malantaŭ la lingvo: kulturon. Lernante la lingvon, ili havas tute neniun ideon pri la lando mem – ties historio, politiko, geografio kaj kulturo... Kaj tio aplikeblas ne nur al Germanio, sed al ĉiuj eŭropaj landoj. Ĝuste tio igis min pripensi apartan kurson pri interkultura komunikado. Nun ĝi okazas kiel parto de ĝenerala komerc-kurso.

Foje studentoj diras: “Jes, bone, sed kiel tio aplikeblas al mi? Mi ne intencas vojaĝi eksterlanden nek gvidi grupojn de turistoj”. Sed en la ĉiutaga vivo ni ĉiuj komuniĝas kun eksterlandanoj, kaj foje la sukceso de nia entreprenado dependas de tio, kiel bone ni komprenas niajn komerc-partnerojn. Ekzemple, la demando, kiel stimuli homojn de diversaj kulturoj, estas ne nur etika, sed ankaŭ interkultura.

“Usonanoj estis la unuaj, kiuj komprenis, ke ili scias tre malmulte pri aliaj kulturoj”

– Kio, laŭ vi, estas la plej granda malfacilaĵo en interkultura lernado?

– Eble, la difino de kulturo mem. Ekzistas multaj provoj difini kulturon, sed ne ekzistas en ili unueco kaj unuanimeco – difinoj de nederlandaj specialistoj tute malsamas de la difinoj de usonanoj.

– Ĉu ekzistas memstaraj interkulturaj kursoj en universitatoj?

– En kelkaj – jes, sed kutime interkulturaj kursoj estas partoj de iuj pli grandaj kursoj – antropologio, psikologio, sociologio, komunikado, komerco... Nun ekzistas, eble, kelkcent interkulturaj kursoj, sed tamen tiu studobjekto ankoraŭ ne estas tre disvastiĝinta. Interese, ke la unuaj, kiuj ekinteresiĝis pri interkulturaj problemoj, estis usonanoj. Ili komprenis, ke ili scias tre malmulte pri aliaj kulturoj, kaj ĝuste pro tio spertas plurajn problemojn. Multaj lastatempaj interkulturaj studoj venas el Usono.

– Bone, sed ĉu specialistoj pri interkultura povas trovi laboron laŭ tiu fako?..

– Jes, certe. Ili povas esti, ekzemple, konsilistoj en grandaj internaciaj kompanioj – kaj tiaj specialistoj nun ne multas.

– Ĉu vi povus doni iujn konsilojn al tiuj, kiuj spertas interkulturajn problemojn?

– Mi kredas, ke ĉiam necesas adapti sin al la konduto kutima en la lando, kie oni loĝas. Mi konstante ŝanĝis mian konduton en la novaj ĉirkaŭaĵoj, unuavice por ne aspekti “tro rekta” (germanoj, laŭ britoj, estas ja “tro rektaj”). Oni ne perdos sian “individuecon” – tute ne, simple alikaze ĉio estos vana...

– Dankon pro la intervjuo – kaj sukcesojn al vi!

– Dankon, same al vi!

Intervjuis kaj trad. el la angla Ĵenja ZVEREVA, Ukrainio

* La seminario okazis en kunlaboro inter TEJO kaj EGTYF – Eŭropa Federacio de Junaj Bon-Templanoj (*European Good Templar Youth Federation* [juropian gud templar jus federeŝn]) – junulara NRO, kiu kontraŭas ĉiujn drogojn. La seminario okazis la 3-10an de oktobro 2004 en la Eŭropa Junulara Centro en Strasburgo

Kristnaskaj kantoj en Esperanto!

Kristnaska kordo. *Akordo*.
KD kun 25
titoloj.

Novembro
2003.

Ĵenja ZVEREVA,
Ukrainio



Esperantujo plenas je ĉiuj specoj de muziko kaj muzikstiloj. Tamen, ĝis antaŭnelonge estis unu ĝenro magre reprezentita: ne ekzistis kolekto de kristnaskaj kantoj. Tamen – fine de 2003 tia disko ja aperis! La rezulto de la brava provo fari E-version de kristnaskaj kantoj estas belega KD kun 25 titoloj, surdiskigitaj de *Akordo*.

Akordo estas okpersona senakompana kantgrupo el Nederlando, jam sufiĉe konata al esperantistoj dank' al ilia unua albumo – *Muzikpluvo*, multaj koncertoj dum E-kongresoj kaj konstantaj elsendoj per E-radioj. La repertuaro de *Akordo* estas tre vasta – de mezepokaj ĝis modernaj kantoj, de popolmuziko al rokenrolo. Malsimile al *Muzikpluvo*, kiun eniris kantoj de la plurjara koncerta repertuaro de la grupo, ĉiuj kantoj por Kristnaska Kordo estis aranĝitaj speciale por ĝi.

Varma, elkora, trankviliga, bonetosa kaj ĝisfunde profesia (malgraŭ ke muzikado por la *Akordo*-anoj ne estas profesia okupo) – tiel mi karakterizis la diskon. Tre plaĉis al mi la zorga elekto de la kantoj: la diskon eniris ne nur la plej famaj kaj tutmonde konataj kristnaskaj kantoj, sed ankaŭ kantoj, nekonataj al la plejmulto. Ekzemple, la famega germana *Stille Nacht (Paca nokt')* apudas kun tradiciaj nederlandaj (la plejparto), germanaj, francaj kaj modernaj usonaj kantoj. Kun granda surprizo mi malkovris kelkajn eŭskajn kantojn, ĉeĥan (boĥeman) kaj kimran kantojn; des pli granda surprizo estis por mi trovi en la disko ankaŭ E-version de tradicia ukraina kristnaska kanto! Kiel fina akordo sonas mia ege ŝatata usona *Mi revas pri Kristnasko blanka (White Christmas)*. La aranĝo de ĉiuj melodioj estas elstara, kaj la voĉoj agrablaj kaj klaraj. Belas ankaŭ la tekstolibreto, kun tekstoj de ĉiuj kantoj. La sola mia plendeto (aŭ rekomendo por la estonteco) – estus bone aperigi ankaŭ la originalajn tekstojn de ĉiuj kantoj kaj kanti unu strofon en la originalo.

Mi rekomendas la diskon al ĉiuj ŝatantoj de trankviliga muziko kaj al ĉiuj, kiuj volus konatiĝi kun diverslandaj kristnaskaj kantoj aŭ fari bonan kristnaskan donacon al siaj geamikoj aŭ parencoj.

La disko haveblas ĉe la libroservo de UEA (prezo – 15 EUR), <<http://katalogo.uea.org>>.

Kutime la diskojn por *KONTAKTO* recenzas nia korektisto (krom ĉio alia, ankaŭ bona muzikisto), sed ĉi-foje mi simple ne povis sendi la diskon – mi ĉiam revis havi kolekton de Esperantaj kristnaskaj kantoj en mia muzikkolekto. Post multfoja aŭskultado mi ekvolis pli proksime konatiĝi kun la grupo mem kaj prezenti ĝin al ĉiuj niaj legantoj, kiuj – ve! same kiel mi! – plej verŝajne, ne havis la eblon viziti la lastan Malferman Tagon en la CO de UEA (tie kiel gastoj estis invitataj ankaŭ *Akordo*-anoj). Kaj – jen la rezulto! La demandojn de *KONTAKTO* respondas la anoj de *Akordo*.

– *Kiel naskiĝis la grupo?*

– Tio okazis en oktobro 1988, kiam Rineke festis sian naskiĝtagon. Tamen la “gravedeco” daŭris iom pli longe: kelkaj el ni jam konis unu la alian kiel kantemulojn dum pluraj E-renkontiĝoj. Sed en la aranĝoj neniam estis sufiĉe da tempo por kanti! Muziko ne estas nia profesia okupo, sed preskaŭ ĉiuj ja kantas ankaŭ en aliaj, ne-Esperantaj ensembloj.

– *Ĉu vi koncertas ankaŭ ekster Esperantujo?*

– Jes, kelkfoje. En 2000, ekzemple, ni kantis dum festotago en Bergen-op-Zoom (Nederlando) – ni ĉestis malfermon de E-monumento kaj dufoje koncertis en la urbocentro, ĉefe por neesperantistoj.

– *Kiel aperis la ideo pri la disko de kristnaskaj kantoj?*

– Ni decidis komenci KD-projekton por havigi al ni novan perspektivon – jam dum sufiĉe longa tempo *Akordo* ne povis koncerti pro manko de aldulino. Krome, laŭ niaj scioj,



De maldekstre: Rineke, Arjen-Sjoerd, Marwine, Jeroen, Saskia, Sander kaj Danny

ankoraŭ ne ekzistas en Esperantujo multaj diskoj kun la temo Kristnasko.

– *Ĉu via grupo havas apartan intereson pri kristnaskaj kantoj?*

– Ne vere. Ni bezonis temon, kiu donas la eblon krei varian kaj internacian repertuaron.

– *Laŭ kiuj kriterioj vi elektis la kantojn? Ĉu estis malfacilaĵoj en la kolektado de materialo?*

– La ĉefaj kriterioj estis kiel eble plej granda varieco laŭ landoj kaj regionoj, ĝenroj kaj epokoj (madrigaloj, tradiciaj kaj modernaj kantoj). Ni tute ne havis malfacilaĵojn pri materialo – fakte, estis eĉ superfluo de ĝi, kvankam la plejmulto da prezentitaj kantoj tamen ankoraŭ ne disponeblis en Esperanto (almenaŭ ne en bona kvalito). La ĉefa malfacilaĵo estis elekti la kantojn!

– *Mi vidis, ke la plejmulton de la tradukoj faris Roel HAVEMAN. Kiel li povis posedi tiom da lingvoj? La eŭskan kaj ukrainan, ekzemple?*

– Roel uzis laŭvortajn aŭ alilingvajn tradukojn. Krome, foje ekzistis alilingvaj versioj. Li rekte tradukis el la nederlanda, angla, franca, hispana kaj germana.

MALANTAŭ LA KULISOJ

Rineke HOENS [rineke huns], 40: “Mi ne okupiĝas pri io profesie, tamen kun tri infanoj kaj muziko kiel ŝatokupo mia vivo estas tre plena”. Rineke esperantistiĝis, kiam ŝi estis 17-jaraĝa.

Hansa KRUGSMAN [hansa kreiĥsman], 44, tradukistino. Esperantistiĝis en 2003: “Dum la somero de 2003 en Hispanio mi konatiĝis kun viro el Kalifornio, kiu klarigis al mi la principojn de Esperanto. Mi tuj ekŝatis la lingvon (mi ŝatas ĉiujn lingvojn), kaj reveninte hejmen lernis Esperanton aŭtodidakte”.

Saskia IDZERDA [saskja itzerda], 36, programistino (retpaĝaroj), esperantistiĝis en 1984 dum intensa unusemajna kurso, pri kiu ŝi hazarde legis en gazeto.

Marwine VAN DER MOLEN, 48, bibliotekistino kaj estro de TTT-ejo, esperantistiĝis en 1982.

Sander VAN HUIJZEN [sandr fan heŭsen], 42, instruisto pri matematiko kaj statistiko; esperantistiĝis en 1979 (per skriba kurso): “Por mi, lerni Esperanton estis maniero agrable ferii en internacia etoso”.

Jeroen [jerun] **BALKENENDE**, 34, redaktoro de nederlanda etimologia vortaro; konatiĝis kun Esperanto, kiam li estis 21-jaraĝa: “Mi konatiĝis kun aktiva esperantisto (la nuna pli juna *Akordo*-basulo) kaj infektiĝis per liaj rakontoj kaj fotoj pri E-renkontiĝoj. Scivoleme memstudinte la lingvon, post sep monatoj mi kun ĝojo spertis miajn unuajn internaciajn renkontiĝojn”.

Danny TEN HAAF [dani ten haf], 36, inĝeniero: “Post kiam Saskia eklernis Esperanton, ŝi entuziasmigiĝis min kaj kelkajn aliajn amikojn lerni la lingvon en hejma rondo, ekde aŭtuno 1984. Kelkajn jarojn poste, du aliaj estontaj *Akordo*-anoj (Rineke kaj Sander) instruis min en kurso por progresantoj”.

Arjen-Sjoerd DE VRIES [arjen ŝurt de fris], 40, laboras en traduk-entrepreno; esperantistiĝis dum la gimnazia tempo ĉe la konata Esperanto-pedagogino Wil VAN GANSWIJK.

Roel HAVEMAN [rul hafeman], 41, tradukisto; konatiĝis kun Esperanto en 1982 (pro revua anonceto). Roel ne estas kantisto, sed la plej ofta tradukisto de *Akordo*.

Alisa... Jes, ŝi nomiĝas Alisa. Mi ne povas diri, ke ŝi estas belulino. Belulino – ne, sed ŝi ja estas beleta. Kiam Alisa al-rigardas min, mi ĉiam pensas, ke ŝi volas ion diri... Sed kion? Tion mi neniam ek-scios, ĉar Alisa fakte... estas hundo!

Alisa loĝas kun sia **mastro** apud la Nigra Maro. Somere kaj fru-aŭtune ŝia domo estas ofte plena de aliaj homoj. Ili venas por **riposi** apud la maro kaj loĝas en la hejmo de Alisa aŭ, pli ĝuste, en la hejmo de ŝia mastro – Saŝa. Alisa preskaŭ ĉiam ŝatas la **gastojn**, kaj preskaŭ ĉiuj gastoj ŝatas Alisa-n. Sed ĉi-foje Alisa havis idojn (nur kelkajn tagojn antaŭe ŝi naskis kvin belajn du-kolorajn hundidojn!). Pro tio Alisa ne ŝatis, kiam homoj iras tien kaj reen – ili ja povas sur-**paŝi** kaj mortigi ŝiajn hundidojn! Sed post kiam Saŝa movis ilin en alian lokon, kio neniu povas ilin trovi, Alisa denove ek-ŝatis la gastojn. Ankaŭ la ge-redaktistojn de **KONTAKTO!**

Ni revenis hejmen je la deka vespere. Fakte, ni tute ne volis reveni hejmen tiel malfrue, sed... ni simple perdis la vojon. La domo de Saŝa (kaj Alisa) staras sur monteto, kaj trovi la ĝustan vojon estas malfacile eĉ tage, se oni ne estas lokano. Kaj kiam estas jam nokto... Tamen, finfine ni trovis la domon, kaj la vespermanĝo en la kun-estado de aliaj esperantistoj ŝajnis al ni la plej bona iam ajn! Ankaŭ Alisa kuŝis apude kaj ĉion aŭskultis...

Ni ĝis-revidis al Saŝa jam ves-



pere, ĉar fru-matene li devis foriri. Li estas tre malsana, kaj devas foj-foje iri al la urbo, al doktoro...

Estis la lastaj sunaj kaj varmaj tagoj de septembro, kaj ni volis kapti la lastan okazon iri al la maro. Krom la “facila” vojo (ĝuste tiu, kie ni perdis la vojon), ekzistas ankoraŭ alia – “malfacila”, kiun konas nur lokanoj. Ĉi-foje ni decidis “provi” la “malfacilan” vojon.

Ŝajnis al mi, ke ŝi aperis el sub la tero – mi tute ne vidis ŝin antaŭe. Mi tute ne vidis Alisa-n ĝis tiam – kaj jen: ŝi staras jam apud ni kaj denove rigardadas nin per siaj grandaj homecaj **okuloj**. “Jes, Alisa, ni iras por ĝis-revidi al la maro. Post du horoj ni devos ĝis-revidi ankaŭ vin, kaj jam morgaŭ ni estos en alia urbo, kie

ne estas maro kaj kie la **arb-folioj** jam estas mult-koloraj. Ĉu vi komprenas?” Alisa nenion respondis. Ŝi simple iris antaŭen, kaj poste mal-dekstren, kaj... **haltis**. “Hej, Alisa, ĉu vi atendas nin?” Alisa simple staris en sia loko. “Nu bone, bone, se vi tiel volas, ni sekvos vin...” Kaj jen komenciĝis ludo. Ŝi iris sufiĉe malrapide, ofte haltis kaj ŝajne elektis la plej bonajn (homopinie) vojetojn. “Ĉu... ŝi vere **gvidas** nin?!” Kaj... post ĉirkaŭ dek minutoj ni jam staris ĉe la maro! Tiam ni estis jam kvaropo – dum la vojo al ni al-iĝis ŝia grandega hund-edzo. Ĝuste tiel – kvarope – ni iris al la **plaĝo**...

La irado hejmen similis la iradon al la maro, krom nur unu afero: ĉi-foje ni iris antaŭe, kaj

Alisa sekvis nin. “Nu jen, ŝi **kontrolas**, ĉu ni bone memoras la vojon...” – “Nu jes, ŝi ja ne povas ĉiu-tage pri-zorgi ‘tiujn du-piedajn bestojn’, kiuj ne povas eĉ memori la ĝustan vojon. Ŝi havas sufiĉan zorgon ankaŭ sen ni – ŝi ja havas hundidojn...” – “Ne, ne, ĉi-foje mi vere ĉion bone memoras. Ni devas iri ĝis... ĝis ĉi tiu arbo... Aŭ la sekva? Aŭ...” Nu jen, ni... denove perdis la vojon! Sed feliĉe estis kun ni nia bona amikino: “Nu, Alisa, vi ŝajne sciis antaŭe, kio okazos... Kien nun?” Alisa al-rigardis nin, kaj ŝajnis al mi, ke ŝi volas demandi: “Ĉu vi certas?” – “Jes, hejmen!” – diris ni samtempe. Post dek minutoj ni jam estis pretaj foriri kaj staris kun niaj aĵoj ĉe la pordo. Ankaŭ Alisa staris apude kaj manĝis **acid-kremon** – nia danko por ŝia bona gvidado.

Mi ne scias, ĉu ni iam ajn denove revidos Alisa-n. Sed ĉiam restos en mia memoro tiu sun-brila septembra tago kaj varma krimea* maro, kaj niaj bon-koraj gast-igantoj – Saŝa kaj lia hundino Alisa, kiu fariĝis nia vera amikino!

acid-kremo – bongusta laktajo
arbo – alta kreskaĵo
gasto – vizitanto, kiu povas resti ankaŭ pli longan tempon
gvidi – montri la ĝustan vojon
folio – “mano” de arbo
halti – ek-ne-moviĝi
kontroli – rigardi, ĉu io estas tia, kia ĝi devas esti
mastro – havanto
okulo – per okuloj ni rigardas
paŝi – meti la piedon sur ion
plaĝo – **ripoz**-loko apud maro
riposi – ne labori

* Krimeo – parto de Ukrainio

ANONCE



Eksa Ĝenerala Direktoro de UEA, Trevor STEELE, kun novaj hindiaj TEJO-anoj

Helpu Esperanton en Hindio!

Esperanto vivigis en novaj partoj de Hindio, kaj multaj gejunuloj eksciis pri la lingvo post 10-tagaĵ kursoj. La foto montras gejunulojn elektitajn por fariĝi membroj de TEJO. Por ke la elano ne estu perdita, bonvolu helpi per donac(et)o al HindAgado (UEA-konto: hind-k) – eĉ malgranda donaco povas tre utili en Hindio.

Junaj esperantologoj prelegu en Vilno

Estas fakto ke jen kaj jen aperas junaj talentaj

esperantistoj kun universitata klero, eĉ kun doktoreco, kiuj verkis interesajn esperantologiajn studojn, prezentis magistrajn aŭ doktorajn disertaciojn aŭ intencas tion fari, kaj tamen restas relative nekonataj. La bedaŭrinde nesufiĉa intereso en la Movado por tia scienca agado ofte sekvigas certan frustrigon aŭ eĉ malaperon de tiuj talentuloj. Sed ni bezonas ĉiun talentulon, ne nur en la sferoj de faka apliko, beletro ktp., sed ankaŭ aparte en la sferoj de interlingvistiko kaj esperantologio. Ja restas ankoraŭ multo por esplori pri internacia lingva komunikado, pri planlingvoj kaj aparte pri Esperanto kun ĝia komunumo, por havi pli bonan, science bazitan fundamenton por niaj klopodoj kaj argumentoj. Pro tio la tradicia esperantologia konferenco, okazonta kadre de la UK 2005 en Vilno, ĉi-foje ne rilatos al iu konkreta temo, sed estu loko aparte por junaj esperantologoj. Ili prezentu siajn studofinajn disertaciojn, diskutigu siajn aperintajn aŭ aperontajn verkojn aŭ informu pri temoj, pri kiuj ili estas laborantaj aŭ pri sciencorganizaj aspektoj de ilia esperantologia agado. Krom tio, la konferenco diskutu, kion ŝanĝi, por ke junaj intelek-

tuloj, provizitaj per diversfakaj modernaj scioj, sin sentu pli forte (ol ĝis nun) stimilitaj verki science pri Esperanto.

Estas planite eldoni la aktojn de la konferenco. La Estraro de CED, kiu aŭspicias la konferencon, inter la altkvalitaj kontribuoj elektos la plej bonan por eventuala aperigo en la sociolingvistika revuo *Language Problems & Language Planning*. En kazo de neceso oni klopodos trovi eblon finance subvencii la partoprenon de taŭgaj kandidatoj.

Interesatoj sin anoncu al D-ro Detlev BLANKE: <dblank.e.gil@snafo.de>.

Ĉu vi nteresigās pri detektivaj rakontoj kaj pri antikvaj civilizacioj?

Tial legu miajn verkojn ĉe <www.arbre-de-minerve.chez.tiscali.fr> (en la franca)! Nuntempe estas du noveloj – heterodoksa rakonto pri la vivo de la egipta reĝino Nefertiti kaj detektiva rakonto pri tio, kio okazis tuj post la forpaso de la egipta faraono Tutankamono. Baldaŭ vi povos legi ankaŭ mian unuan detektivan romanon pri greka filozofino kaj matematikistino Hipatia (Olivier GAUDEFROY, Francio).

La hundkolerozo

Sejjed Navvab MOZAFFARI, Irano

En la malproksimaj tempoj, kiam mi ankoraŭ estis juna kaj serĉis la veron ekster mi mem – sur la stratoj, vojoj, inter la urboj kaj popoloj, kiam mi ankoraŭ ne sciis, ke la vero ne akireblas ekstere, mi multe vojaĝadis. Oni povus eĉ diri, ke mi estis “vojaĝisto”! Mi volis vidi multajn homojn, viziti pensulojn, kredantojn, babili, diskuti kun ili kaj vivi ene de iliaj civilizacioj. Mi ne vojaĝis per aviadiloj. Ĉar aviadiloj preterpasas la civilizaciojn tro rapide. Mi ne vojaĝis per trajnoj. Ĉar trajnoj trairas la civilizaciojn ne lasante sufiĉan tempon por ekkoni ilin. Mi ne vojaĝis per ŝipoj. Ĉar ŝipoj preterpasas civilizaciojn nur laŭ akvovojoj, kaj akvovojoj ne estas bonaj montrofenestroj por la civilizacioj. Mi vojaĝis per mia propra aŭtomobilo, ĉar per aŭto mi povis halti kie ajn mi volis...

Dum miaj vojaĝoj, iutage, direkte al la sunsubiro, mi atingis urbon bel-pejzaĝan. Tie staris altaj konstruaĵoj, trafikis kelkkoloraj aŭtoj, ofte trapasis gigantaj ŝipoj kaj ŝipetoj; ĉie videblis neon-lumaj surstrataj manĝejoj, restoracioj, kinejoj, teatroj, ĝardenohavaj universitatoj, de kies studentaro brilis la lumo de scio; purigitaj stratoj, kelk-haŭt-koloraj homoj en bone gladitaj vestaĵoj kaj multaj aliaj interesaj aĵoj, kiujn vi mem konas.

Mi decidis ripozi tie, eĉ resti kelkajn tagnoktojn aŭ eĉ kelkajn monatojn, se al mi plaĉos loĝi tie. Aŭ eĉ studi la plej laŭmodan fakon – humarajn studojn – en unu el la famaj lokaj universitatoj. Kun tiaj ideoj en mia kapo, mi komencis promeni en la urbo kaj serĉi la oficejojn por prepari miajn dokumentojn.

– Vi devas tuj foriri el mia urbo, – diris kolerante, ruĝiĝinte kaj tondro-tone viro, de kiu mi demandis la unuan bezonatan adreson.

– Kial, grandsinjoro? – mi lamentis.

– Ĉar mi diras, tial vi obeos! Ek! Tuj!

Kiam ni interparolis, ĉirkaŭis lin medicina

teamo ĵus alveninta per ambulanco. Ili metis la viron en la aŭton, injektis en lin grandan ampolon de iu medikamento kaj fermis la pordon. Kiam la kuracisto volis foriri, mi demandis: “Kio okazis al li, sinjoro kuracisto?”

– Disvastiĝis en la urbo iu nova malsano, kiun ni nomas “hundkolerozo”. La suferanto senkaŭze koleriĝas, kaj kiam la malsano progresas, li aŭ ŝi pli kaj pli koleriĝas ĝis frenezigo kaj poste mortigas aŭ sin, aŭ aliajn!

– De kie ĝi venis?

– Ni ne scias. Eble de homa kulpo! – li ekridetis.

– Kiel ĝi disvastiĝas?

– Per haroj de hundoj.

– Kaj ĉu hundoj mem malsaniĝas?

– Jes, samkiel homoj.

– Ĉu eblas kuraci de ĝi?

– Ankoraŭ ne. Sed ni trovis ion, kio povas teni la malsanon – temas pri ekvilibro inter nombroj de malsanaj hundoj kaj de malsanaj homoj...

Mi ne komprenis lian lastan frazon, sed ne sukcesis peti plian klarigon de li, ĉar li foriris kun la teamo.

Ekde tiu horo, diversloke, de horo al horo, mi vidis similajn scenojn. Viroj, virinoj, gejunuloj kaj maljunuloj, kiuj ĵus malsaniĝis, estis ĉie. La hospitaloj pli kaj pli pleniĝis. La laboratorioj laboregis por trovi pli novajn kaj pli efikajn kuracilojn. La nombro de novmalsanaj hundoj kreskis pli-malpli same kiel la nombro de malsanaj homoj.

La malsanaj homoj sentis fortan emon mortigi, disŝiri kaj manĝi hundojn. Ankaŭ la malsanaj hundoj mortigis, disŝiris kaj manĝis homojn. Estis gehene ĥaosa kaj tohuvoĥa situacio. Neniu fidis sian apudulon, eĉ se li aŭ ŝi estis patro, patrino, filo aŭ filino. La hundoj, kiuj dum miloj da jaroj estis simboloj de fido, fideleco, konfido kaj gardemo, ŝanĝiĝis en homaj mensoj en hom-mangantajn drakojn...




Sed iumatene mi rimarkis ian ekvilibron, silenton kaj kvietigon sur la stratoj, kvankam ĉie la situacio similis al tiu en milito: amasoj da vunditoj, mortigitoj, mortintaj hundoj kaj homoj. Mi interesiĝis, aŭskultis radion, spektis televidon, legis ĵurnalojn, demandis la sciulojn... Finfine mi komprenis, ke la nombro de malsanaj hundoj kaj homoj egaligis, do, iliaj fortoj estis tute samaj! Efemera miraklo. Ne plu homo povis mortigi hundon aŭ hundo homon. Jen longe atendita situacio! Tio daŭris longe. Sed samtempe ankaŭ la ĉiutaga vivo haltis. La popolo ne sciis, kion fari...

Irante de la centra preĝejo, la homoj levis la manojn al la Ĉielo kaj petis helpojn. Grumblis, tondris, fulmis kaj... jen unu hundo estis mortigita de la fulmo! Mi kvazaŭ aŭdis voĉon en mia sino: “La lastan fojon”! Mi ne komprenis la signifon. Mi rigardis la vizaĝojn de la apuduloj. Ŝajnis al mi, ke ĉiuj aliaj ekaŭdis la saman voĉon en siaj sinoj. La ekvilibro ne plu estis, kaj la forto de homoj denove estis pli ol tiu de hundoj. La homoj, ĝoj-kriegante, atakis la hundojn, mortigis, disŝiris kaj manĝis ilin...

Kiam la loĝantaro de la urbo pretigis sin rekonstrui sian civilizon, mi forlasis la urbon. Pli poste mi aŭdis, ke la sciencistoj de la urbo tagnokte laboras, serĉas kaj pripensas fari novan kuracilon, kiu kapablos pacigi la malsanajn hundojn kaj homojn de la urbo... por ke poste ili povu kune batali kontraŭ la homoj kaj hundoj de najbaraj urboj... Kaj mi ne scias, ĉu ili jam sukcesis aŭ ne...

<Libroservo de UEA proponas>



Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj. Leah LEVIN. Trad. E. GRIMLEY EVANS. UEA. Rotterdam. 1998. 140 paĝoj. Prezo: 9,90 EUR.

Internaciaj lingvoj kaj internaciaj homaj rajtoj. Robert PHILLIPSON. UEA. Rotterdam. 2002. 19 paĝoj. Prezo: 2,10 EUR.

Rajtoj? Trad. Minh Kinh. Vjetnama Kuriero kaj VPEA. Hanojo. 1981. 145 paĝoj. Prezo: 0,90 EUR.

Kio estas demokratio? 80 demandoj kaj respondoj. David BEETHAM, Kevin BOYLE. Trad. G. SUTTON. UEA. Rotterdam. 2000. 143 paĝoj. Prezo: 9,90 EUR.

Monda federacio? Ampleksa analizo de federacia mondregistaro. Ronald J. GLOSSOP. Trad.

J.RAPLEY. Ronald J. GLOSSOP. Jennings. 2001. 356+12 paĝoj. Prezo: 30 EUR.

Al lingva demokratio / Towards Linguistic Democracy / Vers la démocratie linguistique. Aktoj de la Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj. UEA. Rotterdam. 1998. 212 paĝoj. Prezo: 10,20 EUR.

Paĉjo, kio estas rasismo? Tahar BEN JELLOUN. Trad. A. LE QUINT kaj J. LE PUIL. UEA. Rotterdam. 1999. 52 paĝoj. Prezo: 6,30 EUR.

Ni ne estas senpovaj. Nie sme bezmocní. Marian REPKA. Trad. P. PETRIK, M. MINICH. Espero. Partizànske. 2003. 137 paĝoj. Prezo: 9,00 EUR.

Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj. Barcelono, 6an de junio



1996. Trad. P. ARTINELLI, G. SILFER. Esperanta PEN-Centro. La Chau-de-Fonds. 2001. 34 paĝoj. Prezo: 7,50 EUR.

Diskriminacio. UEA. Rotterdam. 1984. 175 paĝoj. Prezo: 7,50 EUR.

Vivbruligita. Honorkrimo. Suad. Trad. R. BOUCHET. Biografiaj, Suad. SAT. Paris. 2004. 189 paĝoj. Prezo: 17,40 EUR.

Pli detale – ĉe <<http://katalogo.uea.org>>.

<Homaj rajtoj en la reto>

<www.coe.int/T/E/Human_rights> – super-rigardo pri homaj rajtoj

<www.echr.coe.int> – Eŭropa kortumo pri homaj rajtoj

<www.cpt.coe.int> – Eŭropa komitato pri prevento de torturoj

<www.coi.int/ECRI> – Eŭropa komisiono kontraŭ rasismo kaj maltoleremo

<conventions.coe.int> – Interkonsentoj kaj konvencioj

<www.coe.int/youth> – Edukado de junularo pri homaj rajtoj

“Modereco kaj toleremo multe pli valoras ol insultoj!”

Unue mi gratulu la *KONTAKTO*-teamon – jen gaze-to ĉiam interesa, kiun mi fieras prezenti al esperantistoj en kluboj aŭ okaze de diversaj eventoj. Aliflanke, mi deziras rebati la artikolon de Francisko SIMONNET (*KONTAKTO* 200, 2004:3), kies enhavo entenas, miaopinie, ne nur krudajn, sed ankaŭ ofendajn vortojn por virinoj koncerne ĉesigadon de gravedeco.

La aŭtoro skribis: “ŝtato pagas por... mortigado...”. Tio ne estas vero. Francio estas demokratia parlamenta lando, kies deputitoj voĉdonas por aŭ kontraŭ leĝoj proponitaj de la registaro aŭ de deputitoj reprezentantaj la popolon, kiu elektis ilin. Poste, alia asembleo (la senato) rajtas rifuzi la leĝon aŭ peti eventualajn ŝanĝojn.

Antaŭ 1979 multaj virinoj suferis pro la malpermeso abortigi. Pro tio, grandega kvanto da virinoj kreis aktivan grupon por atentigi ŝtatpotenculojn pri tio. Ankaŭ la tiama ministro pri sano – sinjorino Simone VÉIL [simon vej] – konsciis pri tio kaj, malgraŭ diversaj minacoj de ekstremistoj, proponis al la parlamento diskuti pri leĝo favora al abortigpermeso. En 1979, post longaj diskutoj, la leĝo estis akceptita. Mi substreku, ke por tiu leĝo voĉdonis 288 deputitoj (maldekstruloj kaj dekstruloj kune), 192 deputitoj (maldekstruloj) estis malfavoraj kaj kvin sin detenis. En Francio, same kiel en multaj aliaj landoj, ekzistas sociala asekuro, dependa de la ministerioj pri laboro kaj pri sano koncerne la leĝojn, sed tute sendependa koncerne la repagon de la malsanelspezoj. La sociala asekursistemo estas financata per la socialaj kotizoj de la laboristaro.

Ĉu buĉado? Absolute ne. Mi trovas, ke estas tre krude kaj eĉ insulte paroli pri “buĉado” kaj “mortigado” al virino, kiu ĉesigas sian gravedecon. Oni scias, ke abortigo ĉiam estas grava afero, kaj ne temas pri simpla operacio. Oni scias ankaŭ, ke virino absolute ne plezure decidigas al tiu paŝo – foje tio estas vera dramo (kiam okazis seksperforto; kiam oni certas, ke la bebo estos kripla, ke li ne povos vivi normale kaj ege suferos; kiam la virino tro junas...). Kaj se ŝi decidis abortigi sin, ni respektu tiun decidon, des pli humile se ni estas viroj.

Pro religiaj aŭ filozofiaj kredoj aŭ sentoj iuj opinias feton sankta, eĉ de la unuaj horoj. Aliaj malsamopinias. Multaj pensas, ke nur post 12 semajnoj da gravedeco necesas trakti la feton kiel vivantan estulon kaj tiam respekti ties vivon. Iuj preferas ĉesigi nedeziratan gravedecon, aliaj gardas la feton. Decidu la koncerna virino mem, kaj ni respektu ŝian opinionon.

Antaŭ ol ĉi tiu leĝo estis akceptita, virinoj ĉesigis la gravedecon kaŝe, en ege danĝeraj kondiĉoj, kaj multaj el ili kripligis; iuj post interveno de abortigistinoj sen medicinaj scioj eĉ mortis. Nur riĉaj virinoj povis tion fari irante al eksterlandaj hospitaloj...

Ne senprezare virino rajtas abortigi sin. Ŝi devas peti tiun ĉi eblon de la kuracisto, kiu lasas al ŝi unu semajnon por pripensi. Se ŝi tamen decidis abortigi sin, ŝi denove vizitas la kuraciston, kiu donas sian konsenton. Poste ŝi renkontiĝas kun la socialaj servoj aŭ asocioj (naskoregula asocio, familiaj asocioj, psiko-

gjoj) kaj denove parolas pri sia deziro. Se fine ŝi vere deziras abortigi sin, ŝi povas tion fari – en kompleta sekureco. Post la abortigo ŝi povas denove renkontiĝi kun reprezentantoj de tiuj ĉi asocioj por eviti psikajn problemojn. Tiam la socia asekuro pagas la elspezojn (115 eŭrojn). Tio, laŭ mi, tute normalas; se estus alie – nur riĉaj virinoj povus abortigi sin en sekuraj kondiĉoj.

Ĉu oni instigas patrinojn al mortigado en multaj ŝtataj organizoj kaj mezlernejoj? Absolute ne, tio estas plena malvero! Mi eĉ povas aserti, ke multaj konsilas gardi la feton. Sed se virino decidis gardi sian bebon malgraŭ ĉiuj antaŭviditaj obstakloj, necesas helpi ŝin trovi solvon, por ke post la akuŝo ŝi ne restu sola fronte al malfacilaĵoj. Necesas ebligi al ŝi bonan zorgon pri ŝia bebo (cetera, la supre menciitaj asocioj penas helpi virinojn ankaŭ en tiaj situacioj); gravas ankaŭ tio, ke ŝi povu kalkuli je modereco de aliaj. Kiel viro mi opinias, ke modereco kaj toleremo multe pli valoras ol insultoj. Nepre necesas esti aŭskultema, atentema, kompatema kaj respekti la decidon de virino (kia ajn ĝi estu!) – kaj poste helpi ŝin.

Ferdi VINCE, Francio

Du militas, la tria profitas

Multaj opinias, ke la milito de Usono en Irako estas necesa kaj justa. Jes, Saddam estis diktatoro, kiu turmentis la propran popolon kaj minacis al najbaroj. Viktimoj de la nuna milito ne tre multis kompare kun ebla granda konflikto, se la iraka reĝimo pluekzistus. Armeo de riĉa lando ne rabis lokanojn kaj ne vendis armilojn al la malamiko. Triumfas libero kaj demokratio, aliaj diktatoroj devas pripensi la averton...

Tamen, rigardu ni pli profunden. Jam en 1991 Irako ekagris kaj aneksis Kuvajton; Usono enmiksiĝis, sed ial ne likvidis la reĝimon de Saddam – ĉu Usono ankoraŭ bezonis ĝin? (Antaŭ 20-30 jaroj usonaj politikistoj estis malpli singardaj kaj povis hazarde eldiri siajn verajn pensojn: “Somoza* certe estas hunda filo, sed ja nia hunda filo!”; “Espereble, onta milito limiĝos per teritorio de Eŭropo” ks.) Oni scias, ke ĉiuj nunaj danĝeraj teroristoj estis dum jardekoj vivtenataj de Usono. Evidente, Usono strebas, ke la mondo estu nestabila. Laŭ la proverbo: du militas, la tria profitas. Homoj en Eŭropo, Azio kaj Afriko pereas, kaj iliaj landoj mizeriĝas, sed Usono riĉiĝas, vendante armilojn al ambaŭ flankoj; poste ĝi diktas siajn kondiĉojn al malfortigitaj ŝtatoj. Se Milošević estis kruela kanajlo – kial ne likvidi lin solan, sen ruinigi la tutan landon?..

Do Usono bezonas ne demokration en Irako, sed montron de sia forto, testadon de novaj armiloj kaj, certe, malmultekostan nafton – por subteni la propran enorme kaj maljuste altan vivnivelon. Usonanoj vivas kelkdekoble pli riĉe ol la cetera mondo, konsumas multe pli da materiaj rezervoj kaj energio. La tuta homaro ne povas vivi tiel lukse: la Tero ne eltenus. La diferenco plu kreskas, ĉar oni tion subtenas: per amase presata papermono Usono aĉetas ĉion, kion ĝi volas; dank’ al obstina propagando de “valoroj de la usona vivmaniero” la stultigitaj homamasoj elspezas grandegajn sumojn por lernado de la angla lingvo, por

usonaj filmoj, sondiskoj kaj Koka-Kolao...

Certe, ne al ĉiuj tio plaĉas. Kontraŭtutmondistoj protestas – sed ili ne multas, ne havas klaran komunan ideon kaj, kio pli gravas – ne riĉas. Ne mirinde, ke en tiaj kondiĉoj leviĝas adeptoj de “alternativaj valoroj”, inter kiuj nun plej rimarkeblas la islama fundamentismo. Ordinara averaĝa homo, ve, ne kutimas cerbumi kaj estas facile trompebla, delogebla per plej primitivaj ideoj – rememoru la historion de faŝismo. La Korano kaj la Biblio priskribas amon al la tuta homaro – sed la fanatikuloj ne legis eĉ la proprajn ĉeflibrojn. La nuntempa kulminon oni vidis la 11an de septembro 2001.

Iam la mondo estis dupolusa, kun kontraŭstaro inter Sovetio kaj Usono. La “Malvarma Milito” kreis problemojn, tamen subtenis ekvilibron danke al zorgoj de seriozaj, konsciencaj politikistoj kaj sciencistoj. La malapero de Sovetunio rompis la ekvilibron. UN ne povas esti efika rimedo por gardi ordon en la mondo: ĝia principo “unu ŝtato – unu voĉo” iĝis absurda; ja grandan parton de ĝi konsistigas etaj, sufiĉe novaj ŝtatoj, gvidataj de hazardaj homoj, vivantaj laŭ la principo “post ni – estu diluvo”, por kiuj tutegalas, kio okazos post ilia oficperiodo...

La homaro ne havas elekton inter bono kaj malbono – la elekto estas inter malbonoj granda kaj grandega. Nun (dume?) en la kontraŭstaro de la totalismaj sistemoj de mondoregado venkas la usona, kiu tamen lasas al ordinara homo iom (efektive, ne tiel multe) da libero. La civilizo povas pluekzisti. Sed apenaŭ eblas prognozi, kio estos post 10-20 jaroj.

Valentin MELNIKOV, Rusio

* Somoza – diktatoreca prezidento de Nikaragvo en 1936-1947

Ĉu intercivilizacia milito?

Ideologio ekzistas aparte de faktoj, ĝi ŝvebas super ni, interpretante ilin por sia profito. Ĉu vi deziras ekzemplojn? Bonvolu! Je kies flanko militis Usono en Jugoslavio? Ĉu je la flanko de kristanaj serboj aŭ islamaj bosnaj? Je la flanko de islamanoj! Ĉu estas konflikto inter civilizacioj?!

Kiun subtenis islamaj landoj de Persa Golfo dum la Dezerta Ŝtormo? Ĉu sian islamiran fraton aŭ koaliciajn kristanojn? Ĉu estas milito inter civilizacioj? De kie aperis tiu Ben Laden? Li aperis kvazaŭ “el sub Zbignew BRZEZINSKI*”. Li estas produkto de la uzado de radikala islamismo kontraŭ Sovetunio. Ĉu vi scipovas kompreni la sencon de la vortoj? Estas unu afero, kiam *iu mem vin malpacigas*, sed estas alia afero kiam *vin oni uzas*.

Kaj HUSEJN? Li estis ja *laika diktatoro*! Al kiuj oni liberigis la vojon? Al fundamentistoj. Terorista islamismo estas ne civilizacia subjekto, sed rimedo. Rimedo por kio? Mi respondas: por radikala rekonstruo de la mondo. La konstruado de la Nova Mond-Ordo ne eblas sen ruinigo de Rusio. Ĝuste tian islamon oni uzas por la ruinigo! En Inguŝio, Ĉeĉenio, la osetia urbo Beslano... Mi ankoraŭfoje ripetas: oni uzas!

Sergej KURGINJAN, trad. Sergej PAĤOMOV, Rusio

* Zbignew BRZEZINSKI – (1929) poldevena usona ekstremdekstra kaj (iam) kontraŭsoveta politikisto

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu patrono de TEJO

Pagante trioblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon; de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- revuon *KONTAKTO*
- bultenon TEJO Tutmonde (oficiala organo de TEJO)
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn

Ĉu vi serĉas korespondamikon?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu 2 internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. KSM pludonas viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.

Skribu: *Koresponda Servo Mondskala*, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio

JUNA AMIKO – internacia e-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

- aĝas 30 jarojn kaj aperas 4-foje jare (marto, junio, septembro, decembro) sur 28 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriloj;
- havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;
- rabato ĝis 50%!

Karakterizas ĝin:

modela stilo kaj facila lingvaĵo (1500 vortradikoj sen glosoj), enhavo tre varia: rakontoj, fabeloj, raporto, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkultura, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.

Vizitu nian TTT-ejon: <www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto/>

Kiel sendi kontribuojn al KONTAKTO?

- ✓ sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan
- ✓ se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi
- ✓ *KONTAKTO* ne estas movada revuo, do ne sendu al ĝi *primovadajn raportojn!*
- ✓ indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo
- ✓ fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ dikajn kovertojn prefere sendu registritaj
- ✓ rete bv. sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (bv. uzi x-kodigon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ ilustraĵoj kaj adresoj en la Interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj! **Koran antaŭdankon!**

Kotiztabelo de UEA por 2005

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Argentino/eŭro	4	11	28	17	10	56
Aŭstralio/dolaro	15	38	94	56	34	188
Aŭstrio/eŭro	9	22	55	35	21	110
Belgio/eŭro	9	22	55	35	21	110
Brazilo/eŭro	4	11	28	17	10	56
Britio/pundo	6	15	37	23	14	74
Bulgario/eŭro	4	11	28	17	10	56
Ĉeĥio/krono	200	490	1220	770	460	2440
Danio/krono	65	165	410	260	155	820
Finnlando/eŭro	9	22	55	35	21	110
Francio/eŭro	9	22	55	35	21	110
Germanio/eŭro	9	22	55	35	21	110
Greklando/eŭro	9	22	55	35	21	110
Hispanio/eŭro	9	22	55	35	21	110
Hungario/forinto	1500	3700	9200	5800	3500	18400
Irlando/eŭro	9	22	55	35	21	110
Islando/eŭro	9	22	55	33	20	110
Israelo/eŭro	7	18	44	26	16	88
Italio/eŭro	9	22	55	35	21	110
Japanio/eno	1200	2900	7300	4400	2600	14600
Kanado/dolaro	14	34	86	52	31	172
Malto/eŭro	6	15	37	23	14	74
Nederlando/eŭro	9	22	55	35	21	110
Norvegio/krono	75	185	460	275	165	920
Nov-Zelando/dolaro	17	44	109	65	39	218
Pollando/eŭro	4	11	28	18	11	56
Portugalo/eŭro	9	22	55	35	21	110
Rusio/eŭro	4	11	28	17	10	56
Slovakio/krono	200	550	1400	900	550	2800
Svedio/krono	80	200	500	320	190	1000
Svislando/franko	14	34	85	51	31	170
Usono/dolaro	10	25	62	37	22	124
TARIFO A/eŭro	6	15	37	22	13	74
TARIFO B/eŭro	4	11	28	17	10	56

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio; Kipro laŭ Malto; Liĥtenŝtejno laŭ Svislando; Estonio, Latvio, Litovio kaj Slovenio laŭ Pollando.

TARIFO A: Honkongo, Korea Respubliko, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Mallongigoj:

MG – Membro kun Gvidlibro

MJ – Membro kun Jarlibro

MJT – MJ malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

MA – Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la revuon *Esperanto*)

MA-T – MA malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

SA – Simpla abono de revuo *Esperanto* sen membreco

Kto – Simpla abono de revuo *KONTAKTO*

SZ – Societo Zamenhof (subtena kotizo aldone al membreco)

PT – Patrono de TEJO: 3-oblo de MJ (ricevas *KONTAKTO* kaj *TEJO Tutmonde*)

DM – Dumviva Membro: 25-oblo de MA (ricevas dumvive la samon kiel MA)

DMJ – Dumviva Membro kun Jarlibro: 25-oble de MJ (ricevas dumvive la samon kiel MJ)

Kiel individuaj membroj de TEJO (MJ-T aŭ MA-T) por 2005 estos registritaj tiuj individuaj membroj de UEA, kiuj estos malpli ol 30-jaraj la 1an de januaro 2005 (t. e. kiuj naskiĝis en 1975 aŭ poste). Ankaŭ Dumvivaj Membroj samtempe membras en TEJO, dum ili estas malpli ol 30-jaraj.

Eblas abonati ankaŭ al *TEJO tutmonde* sen membreco en TEJO. La abonprezo estas duono de la MJ-kotizo por la koncerna lando.

Oni povas pagi pere de la perantoj de UEA, aŭ rekte al UEA per giro al ĝia banka aŭ poŝta konto, per ĉeko aŭ poŝtmandato, aŭ per kreditkarto.

KONTAKTO: Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA). **Fondita** en 1963. **N-ro 203** (2004:5), 40a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ. 90 landoj. **TTT-paĝo:** <<http://www.tejo.org/eldonoj.jsp>>. **Eldonanto** (administrado, abonoj, anoncoj): **UEA:** ✉ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@inter.nl.net>. **Redakcio:** *KONTAKTO*, p/k 89, UA-01030, Kievo-30 Ukrainio; ret-adreso: <konto@tejo.org>. **Redaktoro:** Eugenia ZVEREVA (Ukrainio). **Vic-redaktoro:** Joel AMIS (Usono). **Ĉef-korektisto:** Pavel MOJAJEV (Ukrainio) **Kovrilo:** Aleksej KOBZENKO. **Presado:** SKONPRES, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <skonpres@poczta.onet.pl>. **Konstantaj kunlaborantoj:** Joel AMIS (Usono), Giancarlo BARALDI (Italio), Morteza MIRBAGHIAN (Irano), OSHO-DAVIES Olúwàbùnmí (Niĝerio), SALIKO, (Finnlando), Behrouz Soroushian (Irano/Francio), ZHANG Xuesong (Ĉinio). **Facilingvaj artikoloj** estas verkitaj en la niveloj *tre facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de *KONTAKTO*. Tiu listo aperas kun la unua numero ĉiujara. **Anonctarifoj:** Tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **Anonctoj:** por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondkuponojn por dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifoj:** varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvintoj:** povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise LAUWEN, Fort Alexanderstraat 16, NL-5241 XG Rosmalen, Nederlando. **KONTAKTO en radioj:** Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): *Radio Havano (Kubo)* Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio / 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea / 19:30, 22:00/21/13 715; <<http://216.138.240.229/rc4>> (je la 15a horo UTC), <http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html> (laŭ mendo tra la servilo de Austria Radio Internacia). *Pola Radio:* elsendoj: 13:30/41,23/7 275; ripetoj: 18:00/42.07/7 130; 20:00 kaj 9:30 sekvan tagon (nur per satelito). La satelita ricevo eblas per: Eutelsat II F – 6 – Hot Bird – 13 gradoj de la orienta latitudo; frekvenco 11,474 GHz, polarizado horizontala (H); subportanto 7,38 MHz. <<http://www.wrn.org/ondemand/poland.html>>, <http://www.radio.com.pl/polina/esperanto_eo.asp>, <<http://start.at/retradio>> **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

Esperanto-paradizo ĉe Danubo

Yenovk LAZIAN,
Armenio/Francio

Alia persono kun tiom da kontrastaj ecoj simple ne imageblas. Malrapida parolado, mallaŭta dolĉesona voĉo, afablegaj manieroj... Tamen rigardu la movojn! Li ne paŝas, sed kuregas. La seĝo ĵus sursidita tuj estas puŝata flanken por rapidegi ien. Mi vane provas foti lin: la fotilo kaptas jen la nukon, jen la dorson en la foro.

Tia estas Amir Mir JAVADI, la posedanto de Esperanto-Paradizo apud Vieno. Iranano, dum la lastaj 25 jaroj loĝanta en Aŭstrio, li aspiras enigi sian domon en la vicon de famaj Esperantejoj, kie oni ne nur renkontiĝu kaj preparolu afer-



ojn, sed ankaŭ vere ripozu kaj bone manĝu. Ankaŭ ĉi-punkte la kontrastaj ecoj de Amir kunplektiĝas: la revemo de ĝisosta esperantisto kaj la ŝtaleca kalkulemo de komercisto.

Ĉies tagnokto enhavas nur 24 horojn. Amir defias ne nur la naturon, sed ankaŭ la aritmetikon. Krom Esperanto-Paradizon, li posedas malgrandan manĝovendejon en la apuda antaŭurbo. Kaj nokte li ŝoforas taksie.

Samtempe, ĉieĉeeste kaj



nenieforeste, ĉiam survoje, jen tuj alvenonte, jen ĵus foririnte. Kial, oni povas demandi. Prefere demandu la elverŝitan hidrargon, kial ĝi diskuras en centoj da brilaj buletoj. Amir estas ĝuste kiel hidrargo.

Certe li ne estas sola – lin ĉiam ĉirkaŭas areto da helpantoj. Ankaŭ kelkaj malhelpantoj, kiel, ekzemple, mi. Vera Babelo: niĝeriano, plia iranano, armenino, aŭstrino, italino kaj plia armeno...

La nomo Esperanto-Paradizo estas tradicia. Post unu el la Universalaj Kongresoj en Vieno, la partoprenintoj kune ripozis ĉe la bordo de Danubo kaj postlasis al la loko tiun nomon, kiu poste oficialiĝis. Sed kiel banloko la vilaĝo Kritzensdorf famas ekde la fru-tridekaj jaroj.

La Paradizo vere paradizas nur kiam brilas la suno... Mi pasigis dekon da tagoj tute neparadizaj pro ventego kaj pluvo. Kiom ajn ĉiofara, Amir tamen ne estas ĉiopova, do ne povas promesi al vi ĉiam-bonan veteron. Estu obstina kiel mi. Apenaŭ ĉesadis la pluvo, mi tuj kuradis al la rivero por naĝi. Nu, ne naĝi, do enpaŝi la akvon kaj lasi la riveron forporti min.



Obstinu, sed tamen atentu: la fluo de la supra Danubo estas fortega, do eĉ kelkminuta ĝuado de la akvo povas finiĝi tro fore de la enirloko.

Se vi ne emas naĝi, vespere eblas danci. Dancado estas alia pasio de Amir. Liaj movoj subite ĉesas esti fulmrapidaj kaj fariĝas elegantaj. La makzeloj de la ĉirkaŭantaro ne plu muelas kolbassandviĉojn, kaj la noktekura veturilo ĝuas la pludormon. Inter ĉiuj paroj fluge glitantaj laŭ argentina tango, Amir kun lia kundancantino elstaras tute majstre.

Proksime al la noktomezo la klientaro disiras. Restas nur lacaj helpantoj kaj plubabilemaj malhelpantoj. Finfine ankaŭ ili interdeziras bonan nokton. Vi iras hejmen, en la ĉambron, kiun vi luis aŭ invadis ĉe Amir en Esperanto-Paradizo. Sekvatage la matena trajno veturigis vin al Vieno, kies priskribon mi lasas al alia, pli lerta plumo...